



Dumonata esprimilo eldonata de Amika Esperanto-Rondo

Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE

Abono en Eŭropo : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF

Speciala abono por nepagipovaj landoj : 40 FF

Ĝiri al : CERCLE AMICAL ESPERANTISTE

P&K : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)

## Solvo... aŭ dissolvo ?

Tiu ĉi foliaro - mi ne kuragâs nomi ĝin gazeto - "perfekte" spegulas kiel statas nun **Laŭte!** :

- \* abunda, diversaspekta enhavo el debatoj, artikoloj, foje preskaŭ literaturecaj, prilingvaj esploradoj, iom da poezio, kelkaj anoncetoj, kaj eĉ kompilaĵo (ĉu ne tro esotera ?), do, sume, unuavide kontentiga por legemuloj kaj... redaktemulo, ĉu ne ?
- \* sed aliflanke ĉion tion fuŝas malica presilo, kiu jam de longe petoladas, jen makulante, jen tiel avarante inkon en iuj lokoj, ke vortoj estas nelegeblaj.

Ne sufiĉas ĉiufoje peti indulgon de la abonantaro. Ĉu tiel daŭrigi venontjare ? Certe ne. Ne ĉion mi povas solvi sola. Mi petas ĉies sugestojn. Kiu eventuale pretus pli bone presi kaj dissendi **Laŭte**-n ekde la venonta jaro ? Ĉu estos surloka solvo, aŭ aliloka ? Aŭ ĉu... dissolvo ?

En la venontaj semajnoj mi esploros, ĉu kaj kiel elturniĝi surloke. Interesatoj mem esploru siaflanke kaj diru al mi, ĉu ili mem povos helpi por solvi la eldonproblemon.

Al ĉiuj, antaŭdankas

Kristiano.

# NIA DEBATO

Kribo :

## Kio plej gravas en via vivo ?

Mi estas konvinkita, ke ĉiu ajn homo celas se ne ĉiam propran feliĉon, almenaŭ propran kontentecon. La rimedoj diferencas laŭ la individuoj, sed la celo restas sama.

En niaj parte sataj socioj, la plimultaj homoj povas relative facile kontentigi la esencajn bezonojn por pluvivi en bonfarto. Do, la eŭropa individuo ĝenerale strebas kontentigi alispecajn bezonojn ol hindo, afrikano aŭ sudamerikano. Li aŭ ŝi strebas, laŭ sia personeco, pli da materia komforto, korpajn ĝuojn, intelektajn plezurojn, konsciencan serenon, feliĉon ĝenerale. La lingvo havas nomojn por la eblaj diversaj sintenoj de homo strebanta al feliĉo. Estas ambiciuloj, idealistoj, altruistoj, individuistoj, hedonistoj, epikuranoj, ktp, ks. Sed ĉiuj tiuj vortoj nur erarigas, ĉar individuo ĝenerale estas miksaĵo. Li aŭ ŝi povas aspekti tio aŭ tio ĉi laŭ la cirkonstancoj kaj ĉefe laŭ la observanta persono.

Kio plej gravas en mia vivo ? Mi kredas, ke la ĉefa afero por mi, kiel por ĉiuj, estas ke la korpa maŝino bone funkcii, ke ĉiuj organoj estu sanaj kaj viglaj. Ĉar kiam tiu ĝenerala bonfarto ekzistas, libere manifestiĝas la naturaj inklinoj de la individuo, kaj ili povas esti kontentigataj. En la nuna periodo de mia vivo - mi estas 54-jara - , mi trovas plezuron vivante ĉiutage en kontakto kun tio, kion urbanoj nomas "la naturo". La verdo de la herbo aŭ de la foliaro, la naturaodoro de la kamparo en ĉiuj sezonoj, la marŝado aŭ biciklado en kiel eble plej "sovaĝa" regiono - ĉio ĉi alportas feliĉon al mi. Sed mi havas aliajn maniojn. Legante librojn, spektante bonajn filmojn, aŭskultante muzikon, esperantumante, preparante broŝurojn kaj la numerojn de **Laŭte**, mi spertas la ĝuojn de perfekta egoisto, ĉar tiujn okupojn mi libere elektis. De pluraj jaroj, do multe pli frue ol tio kutimas, mi bonŝance povis liberigi min de la profesia trudo...

- Nu, vi demandas, kaj kun la aliaj individuoj, kiaj estas ciaj rilatoj ? Ĉu ci ne klopodas feliĉigi aliajn personojn ?

- Mi kredas, ke feliĉo estas persona, ĉiutaga, eĉ ĉiumenta stato, kiu fakte pliriĉiĝas per alies feliĉo. Tial ĉiu individuisto rekte profitas mem, se li aŭ ŝi povas iel kontribui al la feliĉo de aliaj individuoj. Sindonemo ekzistas nur ĉar ĝi ekhavigas plezuron aŭ kontenton al sindonantoj.

Resume, mi estas aĉa individuisto, por kiu plej gravas en la vivo la individua feliĉo. Mi konfesas, ke tio estas tre banala. Sed ĉio cetera ŝajnas al mi eĉ pli banala...

Patriko :

*Kio gravas en mia vivo, tio povas esti nur cirkonstanca. Se iu en mia hejmo malsaniĝis, jen plej gravas lia resaniĝo. Kaj se mi estas malebligata ion fari, nu tiam plej gravas la rimedo por ebligi la faron.*

*Mi ja ŝatas aĵojn kaj farojn plie ol aliajn, sed ankaŭ tio estas cirkonstanca. Kaj mi estas eĉ malkonstantema persono.*

*Kiuj bezonas en sia vivo celojn kaj vivas nur proe kaj pore, tiuj riskas vivi iluzie.*

*Mi estas politike individuisto, sed spirituale malindividuisto, aŭ plibone transindividuisto... Por mi, individueco estas rimedo kaj ne celo. Ĉio, kio al nia individueco rilatas, tio estas relativa. Kaj kio plej gravas en nia vivo, tio estas ekster nia individueco, kaj ne povas esti relativa sed ja absolutaĵo pri kio ni konsciiĝas per abstraktigo de nia individua persono.*

*Kio plej gravas en nia vivo, tio estas ties senco kaj kialo, kiuj ne povas esti ekkonitaj de ni sed nur riveliĝadas tra nia vivado. Tio estas konsciiĝo pri kio gravas kaj kio ne gravas en la vivo.*

*Kaj kio (plej) gravas en nia vivo, tio ne estas nia individueco kaj ties plezuroj kaj funkcioj, kiuj pereas kun tempo kaj morto, sed tio, kio estas kialo de nia vivo, fortikiĝas nin kaj plibeligas kaj donas al ni esperon kaj fidon pri io eterneca, neperea, absoluta ene de ni, tio estas amo.*

*Se ne tiel, ĉio estus senvalora.*

**Vilhelmo LUTERMANO : Belon,  
por kompensi aĉon**

Ĉion skribitan de Kribo en lia enkonduko mi povas plene subskribi (krom kompreneble tiun "alies feliĉo", kiun mi ŝanĝus en "aliula feliĉo" aŭ en "aliies feliĉo" - sed jen jam ĉio.

Krom tio, ekzistas individuaj specifajoj, ekzemple miaj, kiuj tamen estas iom ekstremaj\*. Kio pleje gravas al mi, estas la foresto de doloro. Tiun mondpercepton mi havas ekde mia akcidento antaŭ preskaŭ kvin jaroj, kiam aŭto faligis min de mia biciklo, rompis mian kranion kaj enigis en ĝin altfrekvencon, laŭtan, aĉan kaj ĉiaman fajfasonon, kiu kelkfoje ŝanĝiĝas en akre tranĉan, neelteneblan kapdoloron.

Restis al mi nur unu solvo : psiĉe adapti min al la situacio. Tio estas : laŭeble eviti la dolorajn fazojn kaj cetere akcepti la fajfadon. Kondiĉoj por tio estas la foresto de streĉiĝo, de laŭtaj bruoj kaj precipe de altaj sonoj. Mia plej grava celo, eviti bruon, kondiĉas do tutan gravan celaron.

Mi do ĉirkaŭigis min per trankvila kaj rave hela naturo. Krom tio, ĝia beleco, kvankam aĉe trafajfata de mia fajfokapo, iom kompensas la aĉan sonon per sia belo. Tiel statas kun ĉiuj agrablaj flankoj de mia vivo : kvankam malbeligataj de mia "aĉigulo" (eĉ la plej belaj momentoj estas de ĝi frapataj), mi nepre bezonas ilin por kompensi la sen ili neelteneblan situacion.

Sed kiuj estas tiuj "agrablaj flankoj" ? Fari ion, kio kontentigas min - ekzemple Esperantigi germanan literaturon. Tiu faro mem jam estas por mi intense pasia okupiĝo : per tio mi moviĝas kvazaŭ rekreë en arte jam en nacia lingvo majstre vortigita realo. Kaj plue ? Kompreneble mi estas plene konvinkita, ke tiuj literaturaj eroj estas konindaj - kaj

\* Bedaŭrinde tiu temo ebligas aŭ filozofian traktadon - kion jam faris Kribo kaj Patriko - aŭ tre personan aliron, kio lasta tiukaze iom ĝenas min. Sed nun jam "enĉenita" en la letterĉenado, mi konsolas min per la ideo, ke mi ne havas alian elekton ol senhonte nudigi mian umbilikon.

eĉ konendaj. Kaj krome mi havas la pretendon, ke miaj Esperantaj tradukoj estas almenaŭ pli fidelaj al la originalo ol iu ajn traduko en iun ajn etnan lingvon, - ĉu ankaŭ pli belaj, pli trafe efikaj, pri tio juĝu la legontaro.

Sed ĉu mi esperas per tio aplaŭdon de la Esperantistaro? Aŭ simple tiun de kelkaj amikoj ? Aŭ ĉu mi aplaŭdigas imagatajn legontojn ? Ĉu mi agas tiel por trovi ekzistokialon por pluvivi kaj por eble superruzi mian morton (ke io utila restu de mi farita, ĉar la individuo ja senreste mortos: morto estas ne la transiro, sed morto ! Oni certe enskribas sin en la "eternan libron" de la universo per amo, laŭ Patrika supozo, sed same certe eĉ la plej sensignifa ago iel konserviĝas, plu disdoniĝas, restas, tiom longe kiom ekzistos la homaro) ? Aŭ eble por ke la inoj vidu tuj, kion mi ŝatas kaj do kia mi estas ? - Mi ne scias, eble ĉiuj ĉi elvokitaj agigoj ludas subkonscie ioman roleton, sed verŝajne la plej forta estas tamen la duobla plezuro : ĝui la banadon en la plej interesaj literaturpecoj (ĉar nenia legado egalas tiom intensan de tradukanto), unue en la originala kaj preskaŭ samtempe en internacia vesto ; kaj foje la triumfon de sukceso, perata de nia genia lingvo. La triumfo estas ne tiu de propra geneco (kiun mi certe ne havas), sed tiu pri ĝuste elektita amatino : mia cellingvo.

Tuŝas min poeta sorĉo mildigante ĉiajn vundojn, aŭ ies klarvida observo akriĝas mian percepton de la realo. Ambaŭkaze mia okupiĝo pri aliies verko efikas al mi plezure kaj do sanige - alterne kun vida, flara, aŭda ĉarmo de ĉio natura, kun agrablaj homoj ĉirkaŭ mi kaj kun ĉiam revata kaj disfoje reciproke realigata amo. Jen mia gravaro.

**Tereza :**

*Komplika estas la homa naturo. Ofte malkontenta pro sia vivo, ĉiam traserĉanta feliĉadon proksiman kaj ne ĝuanta la nunan momenton.*

*Certe hiam iu tragikaĵo trafas nin, hiam ni travivas gravajn perturbojn pri familianoj, ĉefe infanoj, ni konscias pri la vera malfeliĉo. Tio ebligas relativigi tiu eventojn.*

*Certe mankas al ni laboro sur ni mem por havi pli kvietan sintenon. Mi partoprenis kun kuracisto al kelkaj kunvenoj*

por ekregi meditadon. Tiam ni parolis kun li kaj la partoprenantoj kaj li provis konsciigi nin pri la fakto, ke se oni ne volas havi tro da reago al la malfeliĉo, ankaŭ la feliĉojn oni devas eviti; ĉar ambaŭ ili alportas al ni streson.

Do por ne suferi oni devas konsenti ne ĝui. Tiel oni iĝas saĝa homo, kiu povas pli trankvile trairi la vivajn eventojn. Sed ĝenerale oni estas malsaĝulo kaj oni pli konscias pri la feliĉo, nur post malfeliĉaĵoj. Bedaŭrinde.

Sed mi konstatis ankaŭ, ke interna ekvilibro ebligas senti sin malpeza, kun sento de feliĉo, sen kaŭzo. Malo povas okazi, ankaŭ sen kaŭzo.

Mi pensas, ke internaj horloĝoj regas niajn humorojn. Kiel atingi tiun ekvilibron? Ĉu, kiel supre dirite, per meditado kaj saĝeco? Ĉu per taŭga nutrado kaj higienaj vivkondiĉoj? Certe, havi sanon, pli precize ne suferon, estas bazo, ĉar kiam la korpo doloras, malfacile oni povas esti kvieta. Kaj kiam la korpo estas en bona stato, mi pensas, ke oni devas agi, vivi sen troigo tamen plene; tiel oni ne havas tempon por plendi.

Jen estas tio, kio plej gravas por mi: trovi ekvilibron inter egoista sinteno sen damaĝo al la aliaj kaj kolektiva agado, respektante mian individuan sintenon, eskapi al stresado per vivmaniero, joko, ne vetkuri al riĉeco, posedaĵoj ktp, profiti de la naturo kaj esti tolerema.

**Jacqueline Lépeix :**

### **PRI ALTRUISMO KIEL FORMO DE SINKONTENTIGO**

Mi konsentas kun Kribo, ke la ĉefa celo de ĉiu individuo estas sin mem kontentigi, kvankam iuj pri tio ne konscias.

Mi persone havas altruisman temperamenton. Tion konstatis ĉiuj miaj familianoj. Mia kuzino Annie opinias, ke tiun trajton mi heredis de nia avo. Mi lin ne konis. Li estis kamparano kaj ne lernis pli longe ol ĝis la fino de la elementa lernejo. Do ni iom malsimilas. Tamen Annie asertas, ke de li mi heredis altruismon. Eble intervenis en tio ankaŭ mia kristana edukigo. Miaj 4 fratoj estis edukitaj same kiel mi, ili ne estas kristanoj, sed ĉiuj 4 havis, aŭ plu havas, respondecon en politikaj aŭ sindikataj movadoj (de diversaj tendencoj, kio iom vigligas la familiajn renkontojn). Krome endus fari studon, ĉu

la proporcio de politikaj, sindikataj, homrajtaj ktp, aktivantoj, estas pli granda ĉe la gefiloj de policistoj.

Do pro ia kaŭzo mi estas altruisto. La malfeliĉo de aliaj homoj povas nin suferigi, psike kaj korpe. Ekzemple, dum la Gofa milito mi havis plorkrizojn kaj psikajn perturbetojn. Mia altruismo alportas al mi kelkajn misaventurojn. Miajn misaventurojn de gastiganto (ne, ne, ne gastiginto: mi plu gastigas!) mi antaŭ kelkaj jaroj rakontis en **Laŭte!** Misaventurojn alportis al mi ankaŭ mia korespondado kun malliberuloj. Nun la iluzion, ke mia vivo iel utilas, mi donas al mi ĉefe pere de Amnestio Internacia. Hieraŭ mi zorgis pri buĉo de tiu asocio, kaj mi riĉarkis, ke miaj kamaradinoj havas saman temperamenton kiel mi: estas por ni malfacile kompreni, kiel homo, kiu dum kvaronhoru spektis la videofilmon pri Ĉadio, povas ne subskribi niajn petskribojn. Ĉiam malfacilas akcepti, ke aliaj homoj nin malsimilas!

Estas vero, ke sano estas io grava, kio fariĝas ĉefa zorgo, kiam oni ĝin perdas. Sed ĉe mi la ĉefa problemo tiurilate estas la psikaj perturboj, kies ĉefa kaŭzo verŝajne estas la seksaj krimoj, kies viktimito mi estis. Por bone farti mi bezonas multe da amo. Ĉar mi timas sekson, mi bezonas ĉefe fratan amon. Fratecan etoson mi trovis en la universitata tempo en la kristana medio. Poste en la SAT-medio. Sed la problemo en la SAT-medio estas, ke multaj SAT-anoj estas ateistoj, kaj ke ateistoj havas strangan riton: ili bezonas regule insulti alipensantojn. Kiam tiun riton pie plenumas gestultuloj, tio min ne ĝenas, kvankam povus esti pli inteligente uzata mia kotizo. Kiam maljuna amiko, kiun mi estimas, kredas sin devigita plenumi tiun riton, tio min ĉagrenas. Aparte doloriga estis letero intence verkita por min vundi. Kvankam la afero reboniĝis, ĝi lasis spurojn en mia psiko: mi ne plu sentas min sekura en la SAT-medio, mi ĉiam estas timanta, ke iu min atakos.

Kompreneble, aparte taŭgas por mia psiko la kredo, ke ĉiuj homoj estas gefratoj, kaj la moralo, ke oni amu sian proksimumon kiel sin mem (tamen ne pli ol sin mem, ĉar tia troigo estas signo de psika malsano). Mi ĝenerale bone fartas en la kvakera medio, sed dum la Gofa milito grave suferigis min la konstato, ke iuj el la kvakeroj de la Karlsru-

he-a grupo aprobas la politikon de Bush. Tio vere riskis min grave malsanigi. Ĝis nun la medio de francaj kvakeroj ludas la rolon de provizanto de la frateca etoso, kiun mi bezonas por bone farti.

Mi rimarkas, ke aliaj laŭtuloj bezonas vivi en la naturo. Mi, ne ! Versajne, ĉar mi kreskis en pariza suburbo, mi ĉe la kamparo enuas. Mia patrino vivas en vilaĝeto. Kiam mi ŝin vizitas, mi kunportas legendajn librojn kaj gazetojn, korespondadojn, kiuj atendas respondojn ktp, ĉar nenion farante mi enuas, eĉ kun floraodoro, birdaj kantoj ktp, ktp. Cetere, la malkapablo resti sen ion fari estas familia trajto : mia patrino havas kulposenton, se ŝi restas pli ol 5 minutojn sidanta sur seĝo. kaj mia onklo Roger ĉiam bezonas. ĉu ripari la kabanon de la kunikloj. ĉu kreskigi iun planton ktp. Mi estas tia homo, sed ne kamparema : ĉar mi estas aparte mallerta mia agemo montriĝas intelekte : mi verkas, tradukas, diskutas, ktp. Krom, ke mi fobias la akvon, mi ne kapablas resti kuŝanta pli ol 5 minutojn sur marbordo. Cetere, mian haŭton de ruĝharulino la suno ne brunigas, sed ruĝigas kaj dolorigas. Do idealaj ferioj estas por mi promeni en iu fremda urbo, viziti ĝiajn muzeojn, rigardi ĝiajn malnovajn palacojn kaj preĝejojn ktp. Tion mi faros ĉe la postkongreso de UEA en Andaluzio. Poste mi flugos al la SAT-kongreso, kaj mi esperas, ke tie oni min ne tro insultos. Kiel fari ? Kiel defendanto de la homaj rajtoj, mi ja devas permesi al miaj ateistaj gekamaradoj plenumi siajn ritojn...

**Suzanne :**

Jam mi plejparte respondis la demandon "Kio plej gravas en mia vivo ?" en mia lasta kontribuaĵo, L! 106.

Mi aldonas tion : longajn jarojn mi deziris vojaĝi. Tiun deziron mi efektivigis, nur kiam mi estis kvardekjara ; poste, mia eniro en la E-movadon ebligis al mi la eksterlandajn vojaĝojn kaj plie... en familia etoso, la plej granda ĝojo en mia vivo.

Kribo skribis : "sindonemo ekzistas, nur ĉar ĝi ekhavigas plezuron aŭ kontenton al sindonantoj". Mi ne tute konsentas. Tion farante, mi ne celas mian propran plezuron. Estas natura inklinado, do mi ne kalkulas por mi plezuron, profiton

aŭ ion similan.

Mi loĝas piede de arboriĉaj montoj kaj plene ĝuas la ĉirkaŭan naturon. Laŭ mi - kaj por mi - ĝi estas la plej bona trankviligaĵo. Kiam mi suferas malbonan animstaton, ĝi malstreĉas min.

**Ĵanseb :**

- Kio plej gravas en mia vivo ?
- Ĉefe tio, kio plej mankas al mi.
- Kio plej mankas al vi ?
- Kompreno pri la absurdaĵoj de la ĉirkaŭa mondo.
- Ĉu ne estas belaĵoj kaj bonaĵoj ankaŭ gravaj por vi ?
- Jes, sed mi malpli pensas pri ili... Alie mi estus respondinta, ke la plej grava por mi estas... oksigeno !

**J.G. :**

Laŭ la franca verkisto Voltaire (Volter), por esti feliĉa necesas plenumi jenajn kondiĉojn :

- esti meze de inteligentaj sed ne pretendemaj kunuloj.
- gustumi diversecon de plezuroj.
- havi amikon, kiu ĉiuokaze aŭskultas kaj konsilas, helpas vin kaj akceptas la reciprokecon.
- ĉiuvespere fari bonan manĝon kun bona vino kaj agrablighata de spritaĵoj.
- ĉiunokte esti brakumata de amanto aŭ amantino.

Kompreneble, mi estas tre malproksima de tiu epikura situacio. Pli modeste, por mi kio plej gravas en mia vivo ?

Unue, bonfarti. Sed tiun staton mi malofte povis ĝui, ĉar preskaŭ de mia infaneco mi havis problemojn pri sano. Tio limigas mian aktivadon.

Due, esti en kunviva etoso, ĉar mi ne povas elteni agresemon. Mi estas feliĉa, kiam oni akceptas min varmkore, malstreĉante iom mian karapacon. Ne gravas la loko naturo, domo... Same kiel ĉe la "Johana" de G. Brassens "La pano similas kukon".

Trie, povi interŝanĝi kun alia persono pri iu libro, iu artikolo, iu agado ktp.

Mi estas tro ofte pesimista. Sendube, mi ne sufiĉe scias

*bone profiti de ĉiu agrabia momento de la vivo, ĉefe kiam mi estas sola.*

*Mi estas individuisto en la filozofia senco : la socio devas celi la feliĉigon de la individuoj, sed mi bezonas ion de la aliaj por riĉigi mian vivon.*

#### **Edmundo :**

Por iriteti kristanojn mi ofte uzis jenan argumenton : Religio, kiu helpas sian kunhomon, estas nura egoisto, ĉar li volas per tio nur veni en Paradizon, sed sendiulo, kiu helpas sian kunhomon, estas vera bonulo.

Certe estas banale, ke ĉiu celas nur propran kontentecon, ĉar tiu konstato ne montras pli da kompreno ol la konstato, ke ĉio estas nur parto de universo, kiu funkcias aŭtomate laŭ fizikaj leĝoj. Ĉi tiu vidpunkto apenaŭ distingas inter homo kaj sampeza kvanto da tero, kaj la alia ne diras al ni, pri kio ni estu kontentaj.

Kiam mi estis juna, mi kelkfoje sentis bezonon por religio. Kompreneble, min ne interesis la stultaj superstiĉoj de kristanismo, do mi kreis propran religion, laŭ kiu la Granda Celo estis la postvivo de la homa raso. Kondukante kiel bona socio, oni subtenas la socion kaj donas modelon por aliaj homoj, por ke ankaŭ ili vivu pace kaj malegoisme, kontribuante al ĉiam pli sekura estonteco por la homa speco. Sed kial la Granda Celo estu la postvivo de la homaro ? Tio estas simpla premiso, nepruvita aksiomo, tamen ĝi ŝajnis al mi iom pli konsekvenca ol la detala kaj evidente arbitra kredaro de la religio, kiun oni klopodis enkapigi al mi en la lernejo.

Oni ja povas juĝi homan konduton laŭ la socio, kiun ĝi implicus, se ĝi estus la normo.

#### **Nicole Déjean : KIO PLEJ GRAVAS EN VIA VIVO ?**

Povos sufiĉi rapida, konciza respondo : AMI LA VIVON !

Ankoraŭ, kontraŭe, mi povus skribi longan tekston, provante bone esprimi min... Estus vane, ĉar mia vivo kiel ĉiuj vivoj estas kiel fluo, aero, moviganta, ŝanĝigema...

Mi rezignos pri pli-malpli kontentiga respondo. En mia vivo plej gravas :

- Konscii, ke neniu sole regas sian vivon, ke ĉiu bezonas ĉeston de socia organizado, bezonas rekonon de siaj plej proksimaj personoj (parencoj, amikoj...), se ne amon. Pro tio, ne forgesi, ke ni respondas kiel socia estaĵo, ke ni havas devojn plenumatajn, rajtojn defendatajn kaj akiritajn, do ke ni devas agi tiasence. (Sincere esti dankema, ricevi kaj doni, privilegii humuron, ridon, optimismon sen eviti la penojn, sen blindigi nin al la realeco).

- Senti, ke mi emas al progresado en mia koro, mia menso, mia konscio, ke homaranismaj valoroj direktas mian vivsintendon, miajn agadojn (ke ĉiuj batoj ne definitive indiferentigu min, ne faru min cinika, malica, malesperanta).

- Havi kapablon komuniki per ĉiuj el miaj sensoj kaj per mia spirito : Ekzisti ! (akcepti eĉ la perturbajn diferencojn ĉe aliuloj, ne por garantii ilin, sed por iĝi pli forta kontraŭ ili. Rekoni miajn erarojn, miajn mankojn, akcepti min, sed ne rezigni).

Vanta kaj fragila estas ia vivo por ia individuo, sed ege potenca kaj miriga en siaj manifestiĝoj. Pro tio, pli valoras iĝi humila kaj respektema al la VIVO kaj kiel eble plej bone ami ĝin.

#### **GAROLO : PLEJ GRAVAS NIA VIVO MEM.**

Plene pravas Kribo kaj Edmundo en la esprimado de la homa "egoismo", ĉar estas pere de la egoismo, ke la "forto de la vivo" manifestiĝas en nia individua sinteno kaj agado, por nia propra pretervivado. Evidente ni kutimas analizi la "egoismon" (ankaŭ la naturajn libidojn) sub formo de ego-centrismo, kio ja estas alia afero, kaj ni eĉ konfuzas "almozon" kun "solidareco". Fakte la karitata almozo de la religuloj estas amuza kaj havas nenian rilaton kun la solidareco, kiun la nereliguloj kutimas nature, normale praktiki. Ĉiamaniere la homoj, kiuj asertas, ke la farado de tiaj "bonoj" estas la plej grava afero en ilia vivo, uzas certan dozon da hipokriteco... kio ankaŭ estas tre natura ĉe la homoj.

Sed ĉi tiu ĉenletero petas, ke oni parolu pri si. Do jen kio plej gravas en mia vivo : estas mia vivo mem. La nura afero, kiun mi ŝatas kultii, estas la vivo sub ĉiuj formoj kaj

tute ne la morto, kiun mi ne timas sed fakte ne aprecas. Ti-un kul-ton al la vivo mi plenumas ekde per trinkado de bona botelo da vino (kaj mi ne pensas pri la sango de Kristo!) ĝis konstrua, kreiva laboro.

Feliĉe, en mia vivo, kaj en tiu konstrua laborado, mi sukcesis akiri liberecon, sendependecon kaj memstarecon, kio estas tute alia afero ol devige, monotone rigardi kaj eventuala signali la pasadon de trajnoj. Kompreneble, mi ne celas mokon al nia amiko Kribo, sed celas sentigi la diferencon inter la teda, angorodona, ĉiutaga laboro kaj la konstrua aktiveco, kie la pigro ne havas lokon.

Mi plene konscias, ke estas tre malfacile kompreni mian malpigremon por tiuj, kiuj ne havis la oportunon agadi libere, memstare, sed devis submetiĝi al "dungo" kun postulemaj mas-troj kaj mizera salajro, en nia absurda sociordo.

Eble pro ĉio tio mi min kredas kapabla skizi sociordon sen dungo, sen salajro, sen ekspluatado, sen ĉeĝoj sed kun plena memstara agado por ĉiuj... tiaj "utopiaĵoj" ankaŭ gravas en mia vivo. Esprimi tion en la kolumnoj de **Laŭte!** aŭ alie certe gravas por mi... gravas vidi la sennaciecon, adopti tutmondan kulturon per Esperanto, gravas analizi la homajn sintenojn eĉ kiam mi, laŭdire, malrespektas, ofendas, insultas miajn homajn kunulojn!... Ja tion mi ne intencas, kaj gravas por mi, ke mi efektive ne alportis malhelpojn, malprofitojn al kiu ajn. Se tion mi iam faris, vi bonvolu publike denunci min, kompreneble per pruvoj, ĉar klaĉadon aŭ simplan opinion mi ne akceptas!

Mi ne posedas veran veron, miaj pensoj fontas el faktoj, el agoj, preter la fantazio, kaj en la realo, eble egoisme miaj propraj konvinkoj donas al mi feliĉon. Plu sincere ol tiel mi ne kapablas min esprimi en la vivado de mia propra vivo. Kiuj ne komprenas mian sintenon, tamen senkulpigu min, bonvolu.



Vortoj

de

Maljunulo



EL MIA GALERIO DE PORTETOJ

## VI. "ABATO" A

En Francio ni nomas abato ĉiujn malalte gradajn klerikojn katolikajn. Tio estas flata troigo. En Esperanto ni diras simple pastro, ekzemple, pastro Ĉe. Tio estas logika. Ni do parolu pri pastro A.

En mia familia albumo estas portreto de juna viro kun belegaj okuloj, en belega vizaĝo. Kvankam oni vidas nur la kapon kaj la ŝultrojn, oni divenas, ke la sutano estas ĝuste tajlorita kaj elegante portata.

Sed kion faras tiu katolika pastro, cetere fremda al la familio, inter tiom da kalvinanoj? Li estis kunlernanto de mia estonta bopatro, en la gimnazio de MENDO, kie ili havis kiel profesoron sinjoron Paul DOUMER. Longe poste sinjoro DOUMER estis elektita prezidento de la Franca Respubliko kaj murdita de duonfrenezulo.

Post la klaso de retoriko kaj filozofio la protestanta cebenano, abituriento, revenis al FLORAKO en la hotelo-restoracio fondita de lia patro, kaj kiun li poste heredis. La katoliko el Ĝevodanio daŭrigis la studadon en la klerika seminario kaj estis ordinita pastro. Ambaŭ konservis interrilatojn kaj la lerneja kamaradeco elvolvigis kaj firmiĝis en vira amikeco. Pastro A., bona muzikisto, komponis kanton kun piano-akompano dediĉitan al la filino de sia amiko, mia nuna edzino, kiu havis belan sopranvoĉon. La melodio estis tre bele adaptita al tiu voĉo.

Ĉiufoje, kiam li venis en FLORAKO, la pastro vizitis

sian amikon, kiu gastigis lin ĉe sia familia tablo en malgranda ĉambro komunikiganta kun la granda manĝoĉambro de la restoracio per pordo plejofte malfermita. Iufoje la pastro alvenis neatendite en vendredo. En tiu tempo al ĉiuj katolikoj estis strikta devo en vendredo manĝi malgrase, tio estas sen viando. La restoraciestro diris: " - Se mi estus avertita pri ĉia veno en vendredo, mi estus preparinta por ĉi iom rafinitan malgrasan menuon... sed...

- Fermu tiun pardonon Kazimiro. Alvenante mi flaris el la kuirujo logan odoron de leporaĵo aŭ io simila. Simple servu al mi ĉian propran menuon. Kiam oni estas gasto de herezulo, oni faru kiel la herezulo. Tio estas nura ĝentilaĵo, do tio ne estas peko."

Tiu libera interpretado de la religiaj devoj manifestiĝis en aliaj cirkonstancoj. Pastro A estis fervora kaj kompetenta spektanto de taŭro-ludoj, en kiuj fine la besto malfortigita sed ankoraŭ danĝera, estas mortigata per spado de la matadoro (hispane: corrida de muerte). En Francio tiu barbara kaj malbela spektaklo estas malpermesita al klerikoj. Li do iris en Hispanio, kie ne estas tiu malpermeso. Aŭ en la amfiteatro de NIMO kaj ARLEZO li iris laike vestita.

Li same sin vestis por ĉeesti teatraĵojn, kie ne decus sin montri en sutano. Oni diris, ke en PARIZO pluraj teatroj malfermis al li siajn kulisojn kaj ĉambretojn de belaj aktorinoj.

En la tempo de la portreto li estis juna vikario en ALESO. Lia nomo en okcitana lingvo signifas amato. Li ja estis tre amata de siaj belaj paroĥaninoj. Eĉ tro. La katolikaj edzoj subskribis peticion al la episkopo en NIMO, por ke la tro amata vikario ricevu alilokan postenon. Li estis sendita al vilaĝo, kie ĉiu konas ĉiun, kaj galantaj aventuroj estas pli malfacile kaŝeblaj.

Per sia inteligento, sia klereco, sia vasta arta kulturo, li povus aspiri al altaj postenoj en la klerika hierarkio. Mi bone vidus lin episkopo. Sed lia skandala konduto malutilis al sia kariero. Li restis sur malalta ŝtupo, kaj li tion akceptis filozofe, ĉar li ne estis ambicia. Al riĉaĵoj kaj honoroj li preferis sian spiritan sendependecon.

Lastafoje mi vidis lin en 1940. Tiam li estis en Nimo deĵoranta pastro en la prizono. Mi estas konvinkita, ke lia parolo alportis helpon kaj esperon al multaj malliberuloj. Mi vizitis lin en lia hejmo, malgranda domo en ĝardeno kun kelkaj fruktaroj. Mi trovis blankharan okdekjarulon, rektan en sia simpla sutano. La marŝo kaj la gestoj estis senafekte elegantaj, la rigardo estis viva kaj juneca kiel en la portreto kaj li konservis de sia provinco iom krudan voĉtonon, kiu eble akcentis lian liberan temperamenton. Ni interparolis precipe pri amiko Kazimiro, kiun li jam longe ne renkontis. En tiu milita tempo Barcelono kaj Parizo estis ne alireblaj kaj eĉ Florako ŝajnis malproksima. Ankaŭ Kazimiro, kiu antaŭe ofte venis al Nimo por spekti taŭro-ludojn aŭ teatraĵojn, jam longe ne plu vojaĝis.

Kiam mi adiaŭis lin, la pastro petis sian servistinon, ke ŝi donu al mi du belajn ĝuste maturajn bongustegajn persikojn el la ĝardeno. Tiu modesta donaco estis al mi tre altvalora.

La portreto de pastro A restos en la familia albumo kiel simbolo de fidela amikeco inter malsamreligiaj.

## Kion vidas blindulo ?

**Nenion** : kompreneble, laŭdifine. Sed "nenion" tio estas rapide dirita.

Por mi ne estas diferenco inter tago kaj nokto, inter luno kaj malluno. Se mi ŝaltas elektran lampon, mi ne scias ĉu mi lumigis, ĉu mi estingis ĝin. Mi vivas en ĉiama nokto. Tio tamen ne signifas en nigro. Se mi provus difini la medion en kiu mi estas, mi eble dirus neŭtrala koloro, mikso el grizo kaj bruno, sed tio estus nur proksimuma.

Iafoje mi vidas, efektive vidas blankan aferon kun nigraj kaj ruĝaj preslitteroj diversformaj kaj konstante variantaj. Tiel rapide, ke mi neniam povas legi vorton. Tiu stranga fenomeno daŭras proksimume minuton. Poste la literoj senorde ekdancas, turniĝas, miksiĝas kaj ĉio na'aperas.

Malofte mi ricevis fulman impreson de blindiga blanko, tiel brila, ke mi instinkte fermas la okulojn, evidente sen-



efike. Sed tio daŭras apenaŭ sekundon.

Mi diris, ke mi vivas en ĉiama nokto. Tio estas vera nur en maldormo. Dorme, en miaj sonĝoj, mi ĉiam estas vidanta kaj bone vidanta. Se mi diras, ke mi estas blinda, la ĉeestantoj en la sonĝoj ne kredas tion, ĉar ili konstatas, ke mi ja vidas.

Je la vekigo, malfermante la okulojn aŭ ne, mi vidas objektojn, kiuj ne ekzistas. Estas mebloj, fenestroj, murpaperoj, kaheloj, tapiŝoj tre detale precizaj, tre netaj. Mi scias, ke ili ne ekzistas, ĉar ili ne estas samaj kiel tiuj, kiujn mi konis. Mi atente observas ilin sed baldaŭ ili stompigās, nebuliĝas, konfuziĝas, kaj mi retroviĝas en tiu kaĉo, kiun mi nomis neutrala koloro manke je pli adekvata vorto.

Mi povas laŭvole elvoki vidrememorojn. Mi vidas la ĝardenojn de Alhambro, la akropolon de Ateno, la plafonon de la Siksta Kapelo, ktp., ktp. Mi povus mencii centon da pejzaĝoj, monumentoj, skulptaĵoj, pentraĵoj. Mi uzis la verbon vidi. Ĉu prave? Certes ne, ĉar ne temas pri realaj bildoj formiĝantaj tra lenso de okulo kaj retino. Kie situas tiuj kvazaŭbildoj, kaj kiel ili formiĝis? Al tiu demando mi ne scipovas respondi, sed ne grave. Mi ne bezonas pli precizigi, ĉar vi komprenas pri kio temas: vi ĉiuj ja posedas la saman fakulton.

Nur al denaskaj blinduloj mi ne povus tion komprenigi. Por ili verdo, ruĝo, blanko, nigro estas vortoj sensignifaj. Ili tute ne povas imagi pejzaĝon aŭ pentraĵon. Mi kompatas al ili. Sendube ĉe ili aliaj sensoj: aŭdo, tuŝo, flaro, tre ekzercite estas pli akriĝintaj, pli subtilaj kaj delikataj ol ĉe ni. Sed al ili tute mankas tiu esenca senso, la vido. Ili ne povas imagi ĝin, probable ili eĉ ne povas konscii pri tiu manko, dum ĉe ni, iam vidintaj blinduloj, tiu manko kruele sentigas sin.

Mi vidis mian blondan pranepojn kreski ĝis sia kvara jaro. Li estas nun pli ol sepjara, kaj mi neniam plu vidos lin. Mi tenis sur miaj genuoj mian brunan pranepineton, kiu estas iom pli ol unujara. Mi neniam vidis, neniam vidos ĝin.

Min konsolas la penso, ke baldaŭ venos la morto, kiu nenigos la sopiron pri la perditaj okuloj. Oni sin konsolas kiel oni povas.

VALO

La franca firmo DASSAULT, kiu estas speciaugita en konstruado de militaj aviadiloj, negocas vendon de tiaj aparatoj al Rusio. Antaŭ nelonge ĝi vendis tiajn aparatojn ankaŭ al Tajvano. La firma DASSAULT estas ĉiam preta vendi al kiu ajn konvene pagas.

Oni memoras, ke en la Gofa milito la franca kaj la iraka aerarmeoj estis ekipitaj per samtipaj "Miraĝoj" de la sama firma DASSAULT.

Sen komento.

## Konfeso

**Profesoro LANGEVIN**: "Fizikisto devas scipovi tri dirojn: Mi ne scias. Mi ne komprenis. Mi eraris."

Mi ne pretendas esti fizikisto, sed mi volonte adoptas por mi tiun regulon.

Antaŭ kelka tempo sub titolo: "Vivu l'armeo!" mi salutis la alvenon en Somalio de blukaska taĉmento kun misio protekti la transporton de nutraĵo kaj kuracaĵoj al la bezonanta popolo. Mi esperis, ke tiu trupo per sia nura ĉeesto kaj montrado de sia forto sufiĉos por teni je respekta distanco la rabistojn.

Nelonge poste, la blukaskuloj tamen uzis siajn armilojn. Mi forgesis la diron de Viktoro HUGO "Kiel longe estos soldatoj, tiel longe estos militoj." Estas ja konstanta fakto, ke portado de armilo estas tentata uzi ĝin, kaj de tento al fero estas nelonga intertempo.

Vi eble rebatos: "Sed tio estis nepre necesa, ĉar en Somalio estas civilmilito kaj almenaŭ unu el la partioj perforte atakas la humanan karavanon."? Ja sendube, sed mi konstatas la konsekvencon: al la viktimoj de la civilmilito aldoniĝas ambaŭflanke pliaj viktimoj.

Sed ni iom pli funde esploru la demandon. De kie la rabistoj tenas siajn armilojn kaj municiojn? Mi ne scias, sed mi suspektas, ke la sinjoroj reprezentantoj de la Unuigitaj Nacioj kunsidantaj en Nov-Jorko je distanco de plumilaj kilometroj scias kaj bone konas la provizantojn de mortigiloj. Kial do ili ne persekutas tiujn cinikajn komercistojn? Mi ne komprenas, aŭ mi tro bone komprenas, sed mi supozas, ke ili estas kapitalistoj, t.e. potencaj homoj, kiujn oni ne

kontraŭas. Kaj mi memoras frazon de Jaurès : "La kapitalismo portas en si la militon, kiel nubo portas fulmotondron."

LANGEVIN, HUGO, JAURÈS, de tiaj pensuloj citaĵoj estas meditando.

Konklude : en kiu ajn cirkonstanco mi ne plu diros "Vivu l'armeo!" kaj mi konfesas : en mia naŭva optimismo mi eraris.

## BAGDADO, SARAJEVO, KTP.

En junio Bagdado ricevis bombojn. Kial ? Oni respondas : "Reprezalio". La usona sekreta servo akiris la konvinkon, ke en aprilo la iraka diktatoro Sadam Husejn preparis atencon kontraŭ la vivo de Prezidento Bush. Mi observas, ke Sinjoro Bush fakte ne estis atencita, kaj fartas bone, dankon. Do ŝajnas al mi, ke tiu reprezalio estas iomete misproporcia.

La bomboj celis kaj trafis la sidejon de la iraka sekreta servo. Tio povas esti iel pravigita. Sed ĉirkaŭ tiu sidejo staras loĝejoj domoj. Ankaŭ kelkaj el ili estis trafitaj, kaj tie estis kelkaj senkulpaj viktimoj.

Eble vi diros : "Tio estas milito, kaj oni ne faras omleton sen rompi ovojn." Tre ĝuste. Mi diras kiel vi : Tio estas milito - kaj milito konsistas el barbarajoj kaj abomenaĵoj.

Kiel komenciĝis tiu t.n. Golfo milito ? Memoru, la iraka armeo invadis Kuvajton. Tuj Usono kaj aliancanoj intervenis, repuŝis la irakan armeon ĝis la landlimo kaj ĵetis bombojn sur Bagdadon.

Nun en Balkanoj okazas iom simila afero. Sarajevo sieĝata ricevas obusojn kaj bombojn kaj serbaj trupoj invadas parton de Bosnio. Ĉu Usono kaj kompanio reagis ? Jes, sed mole. Oni voĉdonas vanajn rezoluciojn, dekretas embargon, kiu restas senefika, svingas minacojn sensekvajn.

- Ĉu do vi dezirus, ke oni milite ataku Serbion kaj mortigu Serbojn ?

- Certe ne. Sed de kiu la Serboj ricevas siajn armilojn kaj municiojn ? Ĉu ne ĉiam de la samaj vendistoj de mortigiloj, de la samaj netuŝeblaj kapitalistoj, kaj mi rediras la vorton de Jaurès "la kapitalismo portas en si la militon..."

Eble vi rebatos : "Sed ankaŭ Sovetio havis tre potencon armeon !"

- Ja certe, kaj oni tion vidis en Stalingrado, en Berlino, poste en Budapeŝto kaj en Prago. Sed ĉu vi opinias, ke Sovetio estis vere komunisma ? Mia opinio ĝi estis ia ŝtatkapitalismo, en kiu la laborista klaso estis ekspluatata kaj subpremata de politika aristokrataro.

Kompreneble tia reĝimo bezonis fortan armeon kontraŭ la eksteraj malamikoj kaj fortan policon interne. Ĝi daŭris 70 jarojn pro pasiveco de la proletaro kaj ŝajnis longe plu daŭranta. Tamen ĝi disfalis preskaŭ subite, senbrue, sen sanga revolucio. Kial ? Ĉu ne tial, ke ĝi vere ne havis solidan bazon kaj profundan radikon en la popolo ? Ĝi estis artefarita same kiel la Sovetia patriotismo. Nun ni vidas refloradon de apartaj naciismoj kaj tradiciaj religioj.

Mi diras "Ŝtatkapitalismo". Per kio ĝi diferencas de la okcidenta privata kapitalismo ? Versajne precipe per tio, ke la okcidenta kapitalismo estis pli evoluanta kaj la sovetia malfruis. La popolo ne havis tiel altan vivnivelon, kaj kompanse en ĝi ne estis mallaboruloj.

Eble tial oni konstatas en kelkaj lokoj signojn de ia nostalgio pri la pseŭdo-komunisma epoko (ekzemple : baloto en Litovio). Post la komunisma iluzio la popolo havis alian iluzion. Nun ĝi povas konstati, ke ankaŭ la merkata ekonomio ne estas panaceo. Kion alportos la historia evoluo ? Mi ne riskos prognozon, ĉar mi probable erarus. Ni atendu. Ni vidu.

**VALO.**

### E-STAGŬ en BOURGES (Francio) la 9an kaj 10an de oktobro 1993

La kursoj okazos sabate (15./18.30) kaj dimanĉe (9./12.) en staĝo aranĝita de "Centre Culturel d'Echanges Internationaux par l'Espéranto", 5 rue Samson, F-18000 BOURGES.  
Por pliaj informoj telefonu al J. Le Puil : 48 61 81 98 aŭ al J. Bousson : 48 20 44 20. Aligojn ricevas : Lydie Trigalot, 24 pl. Montesquieu, F-18000 BOURGES.

## El ciaj vortoj kaj por ci, K-do Valo

De jardekoj la "Laituloj" legas la nemaljuniĝemajn vortojn de eterne juna maljunulo. Ĉi tiu frazo mia ne estas galmatio, eĉ se tio kion mi plue skribos, aspektos nekrologo... al vivanta homo.

### Kulto al kadavroj

Iam, okaze de recenzo al mia libro "**Satana Anĝelo**", kiun ci tro laŭdis, ci, k-do Valo, demandis al mi, kion mi opinias pri la kultoj al mortintoj. Mi respondis al ci (kaj mi uzas la pronomon "ci", ĉar la individuistoj kiel ci ne meritas, ke oni kolektivigu ilin per la malpreciza "vi") ke, ĉar mi rifuzas sekvi ĉiujn formojn de kultoj, mi evidente ne povas kulti la mortintojn. La kulto al mortintoj, al kadavroj, estas unu el la plej malraciaj sintenoj de la homoj, kiuj ja timas la morton. Mi aldonis, ke, se homo meritas omaĝon pro senripoĉa konduto, pro bonfaraj agadoj, pro konstruaj faroj, la plej bona kulto, kiam oni povas fari, estas ĝuste sekvi la ekzemplon, imiti la agojn de tia homo. Jen, k-do Valo, sendepende ĉu ci ankoraŭ vivos kelkajn jarojn pliajn (espereble, jes) aŭ ne, permesu ke mi instigu ĉiujn "laitulojn", ĉiujn SAT-anojn, ĉiujn Esperantistojn, ĉiujn homojn, ĝuste sekvi cian ekzemplon de klarvida, lucida, memstara pensanto dum ci ankoraŭ vivas. Estas la minimumo, kiun ci meritas... kaj mi ne skribos cian nekrologon!

### Restu feliĉa

En ciaj "**Etapoj**" de Laŭte n-ro 105 ci montras cian fizikan velkigon. Ne forgesu, ke ci estas privilegiulo, kiu nur je okdek jaroj eksentis tian fizikan maljuniĝon. Por konsoli cin, mi konfesas al ci, ke mi naskiĝis 30 jarojn post ci kaj mi sentis la maljuniĝon kiam mi estis 50-jara! Kiel ci diras, gravas la mensa funkcio, kiun ci daŭre, admirinde, kun cia sama klarvideco uzas. Mi longe pensis pri ci, kiam ci perdis la vidkapablon; laŭ mi, tio devas esti terura, sed ci facile akceptis kaj superis la fatalaĵon... Cia kuraĝo estas escepte admirinda, en cia, ies eterne, juna spirito.

Ci skribis "**70 jaroj sub la verda standardo**", intertempe pasis preskaŭ 20 jaroj pliaj, tiel ke cia agado por la kulturigo per Esperanto estas preskaŭ 90-jara, kia feliĉo cia! Kaj

mi, sendube ankaŭ ĉiuj legantoj de **Laŭte** legis ciajn modelajn skribaĵojn, "**El la kara infaneco**", "**Migrante tra metioj**", originalaĵojn, tradukaĵojn, finfine plenpleno da riĉa, racia vivo ja preskaŭ ĵaluze enviinda de ni ĉiuj.

Mi konfesas al ci, ke mi ofte identigis mian vivon al cia vivo, ĉar ni havis tre similajn trajektoriojn de teknikisto, de ateisto, de liberecano, de montmartra koboldana kabaretulo ktp. Ofte, dum jardekoj, kiam mi pensis pri socia problemo, mi estus dezirinta scii cian penson pri la koncerna problemo. Plej ofte por mia granda plezuro, ĉar ĝi ĉiam kongruis al mia pensmaniero, ĝi aperis en la paĝoj de **Laŭte** aŭ de **Sennaciulo**. Mi humile konfesas al ci, ke cia agado de lucida pensanto instigis min al plua aktivado... Tamen ci, troige, ne bezonis pensi pri Maksimo Gorkij, kiam ci skribis la antaŭparolon de mia eseo "**Moderna mito: la Kolektiveco**".

Dankon, K-do Valo, kaj restu feliĉa, eĉ se ci opinias, ke ci travivas cian lastan etapon.

GAROLO, Majo 1993.

## NOVAĴOJ ĉe SAT-BROŜURSERVO

- \* **RAKONTOJ I**, de Kafko, trad. V.Lutermano, 36 paĝoj.
- \* **INSTRUI ESPERANTON POR KOMUNIKI** (skizo pri la komunik-situacia instrumentado), de Catherine Samain, 16 paĝoj.  
Temas pri la artikolo aperinta en L! 101-102 de 1992, sed nun pliriĉigita kaj disponebla en aparta broŝuro.

Ambaŭ broŝurojn ricevos aŭtomate la broŝurabonantoj. Ceteraj interesatoj povas mendii ilin al la broŝurservo en BEAUVILLE laŭ jenaj kondiĉoj:

**Rakontoj de Kafko**, prezo kun afranko: 15 FF  
**Instrui Esperanton...**, prezo kun afranko: 8 FF.

Kompreneble, ankaŭ la ĉi-kune aldonita teksto de Bellamy, **PARABOLO PRI LA CISTERNO**, estas aparte disponebla ĉe la broŝurservo. Mendkodo PC, prezo: 5 FF.

La fama pamfleto de Paul LAFARGUE, **LA RAJTO DE PI-GRO**, tr. Kribo, estis reviziita de amikino D.C. Ĝi espereble estos reeldonita antaŭ la jarfino. Pli trafe aktualan tekston ni malfacile povus trovi!...

## Inter policano kaj fizikisto

"Nu, sinceran simpation mi sentas al vi (la maljunulo diras). Tial ion mi proponu : eksciu, ke mi kun malmultaj familianoj kaj amikoj starigis ĉambromuzikan orkestron. Venontan vendredon ĝi estas ludonta tri kvartetojn. Ĉu plaĉus al vi partopreni en la aŭskultado ?"

J.R., studento pri medicino, entuziasme jesas kun el-kora dankesprimio. La maljunulo precizigas la ĝustan adreson : S-ro A.B., sur strato de Vaugirard, numero..., je la tria etaĝo maldekstre. "Ĝis vendredo je la oka vespere."

Dum batas la oka, akurata J.R. sonorigas. La pordon malfermas S-ro A.B. mem. "Jen mia juna amiko. Ni ĝojas. Envenu nur." Kaj la interkonajn vortojn li elparolas: "Jen miaj edzino, filino, bofratino, nepo Andreo, kiu studas en altlernejo por mar-oficiroj ; alia nepo Marcelo, studento pri jurscienco ; kaj mia nevo, kiu intencas pas-triĝi." Ĉiu kun surlipa rideto afable akceptas la enveninton. Tamen nedifineblan impreson ĉi-lastata ricevas : ĉu pro la loĝejo ŝajne malnoveta ? pro la gaslumigado, rokokostilaj surmeblaj bagatelajoj ? pro la eksmoda vestomaniero de la tieuloj ? Malfacile por analizi. Li baniĝas en etoso plena je senmanka afableco, sed kvazaŭ pasintepoka. Kaj J.R. enpense konkludas : "La sorĉa povo de mia naskiĝurbo Parizo neniam ĉesos ĉe mi."

Dum la muzikila agordado la maljunulo sidigas sian vizitanton en komfortan fotelegon kun puntotuketo ĉe la kap-apogilo. Jen post kelksekunda silentado la unuaj taktoj sonas. Mirinde kunludas ĉiuj ĉi tiuj amatoroj. J.R. frandas tri sinsekvajn kvartetojn de Mozart, Geminiani kaj Stradella.

Varmaj aplaŭdoj. S-ino B. cirkuligas sensoifigajojn, dum ĉiu eldiras sian opinion pri la ĵus aŭditaj muzikpecoj kaj J.R. miras pro la ĝusteco de la taksado en neprofesiula medio.

Post momento la seminariano signas al li kaj ambaŭ retiriĝas en flankan ĉambron duon-salonan duon-bibliotekan, kie ili pasie interŝanĝas siajn vidpunktojn pri mu-

ziko kaj spiriteco. Sed post longa fajra diskutado J.R. ekkonscias, ke jam batis noktomezo. Li adiaŭas kaj foriras.

Atinginte la stratangulon, li eltiras cigaredon el sia cigaredujo kaj esploras la pantalonan poŝon serĉe al la fajrigilo ; sed li memoras, ke ekbruliginte la cigaredon de la kunparolanto li metis ĝin sur apudan tablon kaj ĝin forgesis tie. Plenhaste li surgrimpas la ŝtuparon kaj sonorigas. Respondo nenia. Dua sonorigado vanas kaj li ekmiras : ĉu eblas, ke ĉiuj jam enlitiĝis ? Trian fojon li longe tintigas la sonorilon, dum koleriĝanta najbaro impetas el sia loĝejo :

- "Ĉu baldaŭ finite ? Kion vi faras ĉi tie ? Al kiu vi celas tiom insiste ?

- Mi sonorigas ĉe S-ro B."

La apudstaranto jam ne plu regas sin. Ekster si li kvazaŭ eksplodas :

- "Diable ! S-ro B. mortis antaŭ 20 jaroj proksimume kaj neokupata estas la apartamento.

- Neokupata ? Pezajn ŝercojn mi malŝatas. Tie mi ĵus pasigis la vesperon.

- La vesperon ĉe S-ro B... Vi, fitrompisto ! Estas absolute neniu.

- Absolute neniu ? Sed la tuta familio estis ja tie antaŭ momento. S-ro B. aranĝis koncerton. Mi estas real-suprinta, ĉar mian fajrigilon mi forgesis en la biblioteko.

- Pri koncerto nun vi aplombas diri... Eksciu, ke se okazus koncerto, mi aŭdus. Bubaĉo, rompŝtelisto, jen kio vi estas."

Kaj desuper la ŝtuparo li ekhurlas : "Homoj, kaptu, kaptu !"

Algrimpas duon-dorma pordisto, al kiu la triaetaĝa luprenanto klarigas, ke junan rompoŝteliston li estas ĵus trafinta. Kaj ĉiuj kune sin direktas al la polickomisarejo.

Konfuzegita J.R. pravas sian identecon kaj aldonas : "Mi estas studento pri medicino. Mia patro estas kuracisto. Jen lia telefonnumero."

Oni vokas la patron kaj la konsternita vekiginto estas

informata pri la loko, kie nun la filo troviĝas. El tia teksomiksaĵo li nenion sukcesas kompreni, sed li senhezite konfirmas, ke la filo avertis lin, ke li estas invitita al amatora koncerto sur strato de Vaugirard. Kaj reakirante la profesion rapidecon : "Mi venas tuj."

Lin ĝisatendante J.R. rakontas la tutan vesperkunvenon al la polickomisaro :

"Tie estis deko da personoj, kiujn mi tute kapablas priskribi, samkiel la apartamenton, kie mi estis antaŭ momento."

Sed la indigninta pordisto enmiksiĝas : "Tio ne estus pruvo, ĉar samas ĉiuj endomaj apartamentoj. Povas esti, ke iun tagon li tien venis por proponi ekzemple polvosučilojn. Tial li priskribaĉos ajnan apartamenton, sed tiun antaŭ 20 jaroj okupatan de S-ro B., ja ne. Ĉar de post la morto de la posedinto ĝi estas preskaŭ senmebla kaj konstante neloĝata.

- Kiu estas la nuna posedanto (la komisaro demandas)?  
 - La prapranepo de la forpasinto.  
 - Nu, (J.R. sugestas), ĉu vi ne konsentus lin kontakti, S-ro komisaro ? Mi dezirus tien reiri kune kun li - kaj vi kompreneble. Mi kuraĝas aserti, ke mi senerare priskribos la lokon. Espereble vi estos konvinkita."

Matenkrepuske la prapranepo estas sciigata pri la tuta okazintaĵo. Li mirkonsterniĝas kaj ekbalbutas : "Provo pri rompoŝtelado ? Koncerto en la salono de... mia prapra-avo ? Nu, mi venas tuj."

Duonhoron poste, ĉiuj, inkluzive de la kuracisto kaj heredinto, survojiĝas al strato de Vaugirard. Atinginte la trietaĝan interŝtuparon J.R. ekhaltas : "Momenton, mi petas. Kion mi asertis, tion mi estas pruvonta. Antaŭ la pordomalfermo la enirejon mi volas priskribi al vi. En ĝi vi estas vidontaj steleon kun reproduktaĵo de helena statueto, grandproporcian marpentraĵon kaj konzolon."

S-ro B. - la prapranepo ĉi-foje - scivole malfermas knarantan pordon. Tiu hieraŭ vivoplena apartamento ĉi-matene odoras je mucido. Tamen en la enirejo la frostiĝantaj envenantoj staras antaŭ polvokovritaj stelec, marpentraĵo kaj konzolo.

- "Kaj nun (la policano demandas), kien ni iru ?  
 - Ĉi tien (J.R. respondas). Post la duobla pordo etendiĝas la vasta salono, kie la koncerto okazis. Dekstre nigras majesta horizontala fortepiano ; maldekstre, eleganta harpo."

Rea pordomalfermo. En la salono, post tukotegitaj foteloj okulfrapas la muzikiloj. Perplekse mutas ambaŭ polickomisaro kaj nuna posedanto.

La studento sin direktas al surmuraj portretoj :

- "Jen mi rekonas S-ron A.B.  
 - Fakte nin rigardas mia prapraavo.  
 - Kaj ĉi tie, en tiu medaliono, ĉu ĝi ne estas la foto de la studento en mar-armea altlernejo ?  
 - Ekzakte. Mia praonklo admiraligis, antaŭ ol li mortis.  
 - Kaj vidu sur tiu muro la portreton de Marcelo B., la studento pri jurscienco.  
 - Temas pri mia avo. Li estis advokato.  
 - Kaj ene de tiu flaviĝinta kadreto el kupro, ridetas ia seminariano, kun kiu ĝis noktomezo mi fajre diskutadis pri muziko kaj spiriteco.  
 - Li estas mia dua praonklo, en Afriko mortinta, kiel misiisto. Sed el kie fontas viaj scioj pri mia tuta familio ?"

Miras la posedanto, kies manoj tremetas : "Aŭskultu bone. Nun mi rememoras pri tio, ke iam mia avo elvokis koncertojn ĉi-loke aranĝitajn de lia propra avo. Nekredeble, ĉu ne ?"

La vizitantoj, ĉiu laŭ propra taksado de la okazintaĵo, traspertas la sinsekvajn skuojn de la emociogamo. Unu post la alia sin direktas al la saloneto, kie sur polvokovrita unupieda tableto kuŝas... la fajrigilo.

\* \* \*

Ĉu vi havas vian ideon, estimataj gelegantoj, pri la deveno de la ĉi-supra rakonto ? Rekte el la arĥivoj de la pariza policoprefektejo. Ĉar post la malkovro de la fajrigilo la polico enketis pri ebla enŝteliĝo en la apartamenton cele al surtabligo de la pruv-objekto. Sed ne fortordita montriĝis la seruro. Se temas pri ŝerco, tia hipotezo du demandojn naskus : unue, kial ŝerco tia-

speco ? Due : kiamaniere la juna studento pri medicino estintus informita pri la familianoj de S-ro A.B., tiu apartaj karieroj, kaj pri la ekzisto de ĉambromuzika orkestreto ?

La juna studento pri medicino, fidinda atestanto, estis nevola rolulo de neklarigita travivaĵo, la policckomissaro konkludis.

Kaj tiel konkludinte, le enketon li ĉesigis.

Tamen, ĉar senlima estas la homa komprenbezono, scienculoj estis petataj doni sian klarigon. Kelkaj simple respondis : temas pri nur hazarda retroaĵo de pasintaj bildoj.

Brita fizikisto, baziĝante sur la teorio de la relativeco, eksplicitis la jenon : ne ekzistas tempo, laŭ kies elflue ĉiu travivita tempero foriĝas. Tute male : estas parolende pri tempo, en kiu kunekzistas la estinto, estonto kaj estonto - tempo unuvorte totala, kies nuran etan parton - la t.n. nunon - ni perceptas, kvazaŭ trae de luko.

Laŭ tiu teorio foje okazas, ke homoj ekkontaktiĝas kun la tempo totala kaj travivas scenojn el la estinto aŭ estonto.

Post tiu pripensiga klarigo al via meditado mi proponu mirindan konkludon :

"Tiu junulo stumblis ĉe la tempo, samkiel aliaj ŝtupon maltrafas."

- Al kiu poeto ni ĝin ŝuldas ? (vi eble scivolos) ?
- Al poeto, iasence jes. Lia nomo estas... Einstein.

S. BONIOL

Noto pri "Subtaksata flaroseno" (L:105) : La fonto de tiu artikolo estas la libro de Diane Ackerman : "Le livre des sens".



## LA ADVERBO EN ESPERANTO

Ĉar mia opinio la dilemo de S-ano Cleber Lemos ne koncernas eventualan kvankam tre malgrandan ŝanĝon de la vortaroj aŭ de la gramatikreguloj, sed nur ŝanĝon aŭ pliprecizigon de la klarigo de la fenomeno de li menciita, mi ĉisube donas mian klarigon mallongan sed, mi esperas, sufiĉan.

Ĉiu vorto en Esperanto, kaj en multaj lingvoj, apartenas al unu el la kategorioj substantiva, adjektiva, verba, adverbaj, pronomaj, prepozicia, numeralaj, konjunkcia, subjunkcia, kaj interjekcia. Notu ke la aparteno al iu kategorio aldonas iomete da signifo al la ĝenerala signifo de la vorto (de la radiko en Esperanto). Zamenhof genie (genie pro reguloj koncerne la vortfaradon) decidis, ke en Esperanto ĉiu radiko jam enhavas tiun ekstran signifeton kategorian, do ke iu ajn radiko jam estas aŭ substantiveca, aŭ adjektiveca, aŭ verba, ktp. Rezulte de tio ni devas lerni por ĉiu radiko, en kiu kategorio ĝi origine troviĝas (ekz. martel-o, flav-a, mang-i, per = prepozicio, ĉar = subjunkcio, ktp). Li krome decidis, ke malgraŭ tio la radiko devas aperi kun sia kategoria finaĵo speciala (-o, -a, -i), se ĝi apartenas al unu el la tri unuaj kategorioj kaj kiam ĝi uzatas kiel memstara vorto (tiu regulo faciligas la lernadon de Esperanto kaj ĝian rapidan komprenadon), kaj devas aperi sen speciala finaĵo kategoria, se ĝi estas en unu el la ses lastaj kategorioj, por kiuj cetere ne ekzistas finaĵoj kaj en kiuj estas relative malmultaj vortoj (ekz. dum, ĉar, ve, dek). Cetere ĉiuj radikoj povas ŝanĝati en alian kategorion, per la aldono de (alia) finaĵo (ekz. martelo, flavo, antaŭa). Tio nomiĝas derivado kaj ĝi inkluzivas etan ŝanĝigon de la ĝenerala signifo de la radiko. Kompreneble tio eblas nur, se ekzistas speciala finaĵo por la nova kategorio. En Esperanto afiksoj estas radikoj en tiu senco.

La adverboj tamen apartenas (grand)parte al la unua speco (t.e. ke ili devas havi originan aŭ derivan finaĵon, "e") kaj (tre malgrand)parte al la dua speco (t.e. ke ili ne havas la specialan finaĵon, uzate nudaj). Tio rezultigas, ke ni havas tri malsamajn traktmanierojn por la adverboj. Jen ili estas :

1-e. La radiko estas adverbeca kaj devas havi la adverban finaĵon "e" se uzata kiel vorto (ekz. nepre, ofte, parkere, precipe, spite, supre, volonte). Se tiaj radikoj estas ŝanĝataj en alian kategorion, la alia finaĵo anstataŭas la adverban finaĵon (ekz. nepra,ofti, precipo). Notu ke en tiaj kazoj la "e" estas finaĵo (adverba), kaj NE apartenas al la radiko.

2-e. La radiko estas origine klasita en neadverbeca kategorio (de iu ajn el la du specoj). Tiukaze oni per derivado ŝanĝas la vorton en adverbon, aldonante al la radiko (plej ofte adjektiveca) la adverban finaĵon "e" (ekz. patre, forte, krie, antaŭe, sede, sese, ree ; ankaŭ kunmetoj kiel ekz. surtere, plenlune, dufoje).

3-e. La radiko estas adverbeca kaj ne havas finaĵon (same kiel la prepozicioj, ktp). Ĉar ĝi ne havas (adverban) finaĵon, la lasta litero, eĉ se ĝi estas "e", apartenas al la radiko kaj ne povas forfali (en kunmetaĵoj) nek ŝanĝati (en derivado) ; (ekz. nun → nuna, hodiaŭ → hodiaŭo, tro → troi, ne → nei, tre → trea). La sama fenomeno aperas ankaŭ ĉe la aliaj, neverbecaj, radikoj ne havantaj specialan finaĵon, ekz. tri → tria (ne "tra"), tra → trai (ne "tri"), pro → proa, proi, proo, ve → vei (ne "vi").

Cetere mi malsamopiniis kun S-ano Lopez Luna, ke la diskutado de la Esperanta gramatiko estas superflua, ĉar la celo de Esperanto estas, funkcii tiel ke miskomprenoj ne okazu, kaj la strikta obeo de la gramatikaj reguloj, kvankam kelkfoje malfacila, estas nepre por ke la lingvo restu fidebla. Sen fidebleco Esperanto ne valoras.

**Marcelo Leereveld.**

\*\*\*\*\*

*Daŭrigante en Laŭte! la reeldonadon de malnovaj sed, laŭ ni, plu interesaj tekstoj - kiuj cetere estos disponeblaj en apartaj kajeroj de la broŝurservo - ni proponas nun tiun "parabolon" de fama socialisto de la XIX-a jarcento : Bellamy. "Jen plia utopiulo", vi laŭte ekpensos. Jes ja, lia "utopio" aperis ĝuste la saman jaron kiel tiu de D-ro Esperanto.*

Pripensinde, ĉu ne ?

*Kristiano.*

La malnovaj legantoj de **Laŭte!** scias, ke tiu gazeto havas ne redaktoron, sed ja redaktanton, kies tasko estas tajpi la ricevintajn tekstojn, samtempe korektante, se necese, la gramatikajn kaj vortajn erarojn. Efektive, ankaŭ la sintaksajn malgataĵojn mi plej ofte korektas, almenaŭ tiujn, kiuj riskas malfaciligi la komprenon.

Al kelkaj geamikoj mi konfesis, ke mi plej ofte eĉ ne legis la tuton antaŭ ol ektajpi la unuan linion. Kiam iu parolas al ni, ni efektive ne atendas la finon de ties parolado por provi kompreni : tuj de la unuaj vortoj la cerbo aŭtomate provas decifri la mesaĝon, ĉu ne ? Do, tuj de la unuaj frazeroj la korektado povas komenciĝi, frazon post frazo. Maldekstre sur la tablo kuŝas P.I.V. Kiam pri io mi ne estas certa, mi kontrolas en ĝi. Ekzemple : Ĉu tiu verbo estas transitiva aŭ netransitiva ? Ĉu taŭgas tiu vorto nekonata aŭ nekutima al mi ? ...

Jam de tridek jaroj mi kontrolas tekstojn; mi supozas, ke mi akiris ian aŭtomatecon por malkovri lingvajn malgataĵojn, sed ne ĉiam mi estas certa pri la solvo. Mi nepre bezonas la Plenan Vortaron por helpi al mia ne ĉiam fidinda memorkapablo. Plej insidaj estas la idiotismoj, ekzemple la "francismoj", kiujn ne ĉiam povas tuj malkovri E-redaktanto, kies gepatra lingvo estas la franca. Ĝenerale, kiam esprimo aŭ frazturno iom tro similas la francan, mi suspekteme haltas por kontroli.

Notu, ke se ĉiuj artikolverkantoj tiel agus, la redaktado fariĝus nura tajpado !

Mi opinias, ke iu ajn povas "redakti" laŭ tiu maniero. Eble en la komenco oni bezonas multe da tempo por senĉese konsulti la Plenan Vortaron. Sed iom post iom oni mem klerigas sin kaj uzas ĝin malpli ofte, des malpli ke multaj eraroj ripetiĝas, eĉ se malsamaj verkantoj.

Se, por akiri parolfluecon en Esperanto, oni nepre bezonas aŭdi aliajn esperantistojn kaj trejniĝi en diversaj situacioj, male, por lerni la skribitan esperanton iu ajn kun tre normala gramatika bazo, povas lerni mem, aŭto-didakte. Ĉio troviĝas en la nenombreblaj gramatikaj E-libroj, kaj ĉefe en PIV. La legado de bonaj aŭtoroj origine verkintaj en esperanto estas la alia nepre rimedo por progresi sen helpo de profesoro. Ankaŭ tiun legadon devas akompani la eventuala konsultado al PIV.

Mi nepre malkonsilas la tro oftan uzadon de vortaro nacilingva/esperanta, same kiel mi malkonsilas al komencantoj provi tuj traduki antaŭ ol disponi pri sufiĉa trezoro, ne nur vorta, sed esprima, t.e. antaŭ ol esti akirinta la kapablon rekte pensi en esperanto.

Mi timas, ke tiu ĉi iom drasta moto multe tro malfrue trafos multajn el ni. Jam de longe, eble de la komenco de nia pasio al esperanto, ni emis tuj traduki en esperanton la tekstojn, kiuj aparte plaĉis al ni en la nacia lingvo. Tiu emo estas tute komprenebla. Ĉu Zamenhof kaj Lanti mem ne cedis al ĝi, kaj kiel majstre ? Kaj kiom da pli-malpli talentoplenaj post ili !

Nu, trankviliĝu, ankaŭ mi. Kaj certe sentalente. Cetere, la tradukado povas esti sendanĝera sporto, eĉ arto, kiam oni praktikas ĝin en la taŭga periodo de la esperantisteco : nome, ne kiel baz-ekzercojn de la unuagradaj kursoj, sed kiel progresigilon kaj eĉ ĝuilon, kiam oni jam kapablas pensi senpere en esperanto.

Ju pli frue vi emos traduki, des pli malfacile estos por vi flue uzi esperanton kvazaŭ ĝi estus via natura gepatra lingvo.

- Ci troigas ! rebatos tiuj, kiujn ŝokas la sennuancaj kondamnoj, aŭ kiuj bonŝance povis eviti la damaĝojn de la tradukomanio.

- Ne tiom, kiom vi kredas ! La plej multaj el ni lernis esperanton malrekte, ĉefe per gramatika metodo, kaj foje eĉ sen rilatado kun loka grupo aŭ jam leŝta verdstelulo. Kiom el ni, eĉ post multaj jaroj da tia ternado, ankoraŭ hezitas, balbutas, aŭ eĉ pli grave, senhezite kaj lavange elverŝas kun aplombo frazturnojn senpere tradukitajn el la nacia lingvo ! Pli grave, jes ja, ĉar tio signifas, ke ili definitive encerbigis, sen korekteblo, amasojn da fuŝ-esprimoj, per kiuj ili povas siavice infekti komencantojn, kiujn impresas ilia ne flueco, sed parolrapideco.

Sur la skriba tereno - artikoloj, leteroj - same gravaj estas la damaĝoj kaŭzataj de la traduka plago. Se multaj ne kuraĝas laŭte traduki publike, ĉar tiam evidentiĝus la nekomprenebleco de ilia "lingvo", male, kiom da, helpe de vortaroj, sentas sin kapablaj traduki ion ajn sur paperfolioj ? Kiam la taskon ili sendas por perkoresponda kurso al kompetenta "profesoro", nu bone, ili eble tiras ion el la korektado. Ja multaj "perfektigaj" kursoj niaj tiel funkcias. Sed ofte tiujn tekstojn, foje broŝure ampleksajn, ili deziras nepre publikigi ! La plej multaj tradukaĵoj feliĉe estas forrifuzataj de la E-gazetoj pro sia senvaloreco, sed okazas ke sendintoj ofendiĝas kaj malabonas la kancernan gazeton. Foje, iuj tradukemuloj eĉ tial forlasas esperanton.

### KONKLUDE

Kiel eble plej frue kaj komplete mergiĝu en esperanton ! Kontrolu E-vortojn, legante en esperanto iliajn difinojn kaj ekzemplojn pri ilia uzado. Se vi devas skribi leteron aŭ artikolon, uzu la vortojn kaj frazturnojn, pri kiuj vi estas certaj. Se ne, sisteme kontrolu en PIV. Jen ja longa laboro, sed

ege riĉiga ! Vi tiel encerbigas rekte kaj preskaŭ neforviŝeble bonkvalitan esperanton. Se vorto mankas al vi, kaj se ne temas pri teknika termino (nur tiam uzu la dudirektan vortaron), nu, esploru PIV-on sammaniere kiel vi esploras vian nacilingvan vortaron kiam mankas al vi vorto en la nacia lingvo. Migrante de vorto al aliaj antaŭ ol malkovri la plej taŭgan, vi multe riĉigos vin : vi lernos elturniĝi mem, evitante la marĉojn kaj ne surpaŝante la putrintajn branĉojn... Vi tiel iom post iom pli facile orientiĝos en la lingvo-ĝangalo. Des pli facile, ke la esperanta ĝangalo estas ja la plej "civilizita", la plej logike komprenebla.

### KALKULO

*Ambaŭ hindua kaj azteka kalendaroj finiĝas en la jaro 2020, kiu respondas en ties religioj al fino de la nuna tempo.*

*Laŭ la historiistoj, Kristo naskiĝis ne la jaro 0 sed jen en minus 4, 7 aŭ eĉ 12. Je la minussepa hipotezo, kiu estas la plej verŝajna, ni jam troviĝas en la jaro 2000, tio estas 27 jarojn antaŭ la dato 2020 kaj tiuj 27 jaroj estas la daŭro de l'antekristaj militoj ĉe la profetaĵoj de Nostradamo.*

*Alia profeto, disĉiplo Johano, donas al ni pri la apokalipsa tempo du ŝlosilojn : ĝi alvenos post tempo, tempoj kaj tempo-duono, kaj la besta nombro kiu estas 666...*

*Se multipliki la tri ciferojn kaj aldoni 0, oni havigas la nombron 2160, kaj se adicii ilin kaj aldoni 0, oni havigas la nombron 180...*

*2160 "jaroj" estas la daŭro de la precesia jaro laŭ Platono kiu respondas al la tria moviĝado de la tero, kaj 180 estas ties divido en 12 "monatojn". Ĉar tempo signifas sezonon, tio estas trimonatan periodon, ni havigas la jenon :*

$$540 + (540 \times 2) + (540 / 2) = 1890.$$

*La Apokalipso estis verkata de Johano je la fino de la unua jarcento de nia erao. Do :  $100 + 1890 = 1990$ .*


*Tio signifas, ke tiu ĉi jardeko estas tiu de la apokalipsa tempo kaj ke tiu ĉi jaro 1993 ja estas la eko de tiu revelacia kaj juĝa periodo.*

*Sed ne apartenas al ni koni la tagon kaj horon, ktp...*

**Patriko.**



- 1275 (garder la tête froide) - ajouter : garder son calme  
- konservi la sinregadon
- garder ses distances : distancafekti
- garder un chien de sa chienne à qn - ajouter : garder une dent contre qn - voir 735
- 1281 (geler à pierre fendre) - ajouter : tia malvarmo, ke ĝi fendas la ŝtonojn
- génie des affaires (avoir le) : havi talenton por negoco
- fig. être sur les genoux : esti ellacigita
- genre (faire du) : afektmieni
- gens de lettre (les) : la beletristoj - voir 1417
- 1284 (les gens de robe) - remplacer par : la robularo, la talaruloj
- gibier à plumes (le) : la birda ĉasaĵo
- 1286 (gibier de potence) - voir 1844
- 1292 (glisser dans le tuyau de l'oreille) - ajouter : subdiri
- goût du jour (au) : laŭmoda
- goutte à goutte (au) : gut' al gute
- goutte au nez (avoir la) - il a la goutte au nez : gutas lia nazo
- grand besoin (avoir) : nepre bezoni
- grand bruit (faire) : elvoki grandan bruon Z
- 1307 (grand clerc) - ajouter "il est grand clerc en la matière"  
- li estas spertulo en tiu fako  
après "akademiano", ajouter : (erudiciulo, Nobelpremiita)
- 1308 (de grand coeur) - ajouter : tutkore - voir 3478
- 1312 (un grand dadais) - ajouter : longkrura naivulo
- 1316 (sur une grande échelle) - ajouter : larĝskale, en granda mezuro
- 1320 (en grande pompe) - ajouter : kun granda pompo Z, en plena parado Z
- grand faim (avoir) : malsategi - voir 1068
- 1328 (au grand jour) - ajouter : sub la sunlumo  
- il fait grand jour - ajouter : estas hela tago
- grand monde (le) : la mondumo
- grand monde (ne pas y avoir) - il n'y a pas grand monde : malmultas la ĉeestantoj  
voir 781
- grands frais (à) : multelspeze
- grand soif (avoir) : voir 657
- grands pas (à) : grandpaŝe
- grand voyage (le) : la eterna vojaĝo - voir 2246
- gras comme un chanoine, comme un moine : graso kiel kanoniko, kiel monaĥo
- gras comme un porc : graso kiel porko
- 1331 (de gré à gré) - ajouter : per komuna akordiĝo
- grève de la faim (faire la) : malsatstriki
- grève tournante (une) : laŭvica striko



## PRI SOCIKREDITO

Tre interese estis publikigi en L! la proponojn de la socikreditanoj. Kiam akriĝas la ekonomiaj problemoj, multaj proponas solvojn. Post disfalo de Sovetio kaj ĝiaj satelitoj triumfas la kapitalisma sistemo. Sed ĝi ne estas kapabla bone solvi gravajn problemojn, ĉefe la senlaborecon. La laboristaro esperis pri socialismo, sed la soveta fiasko ĝin malkuraĝigas. Mi opinias, ke ne temas pri fiasko de socialismo, sed nur pri provo efektiviĝi ĝin en malfavoraj kondiĉoj kaj per maldemokrata povo. Necesus trovi pli bonan difinon de socialismo kaj pli efektivegeblan realigadon.

La socikreditanoj proponas solvon sen fundamentaj ŝanĝoj, nur pri kelkaj detaloj. Ilia ĉefa propono estas pri la mono. Laŭ ili, mankas mono. Sufiĉus cirkuligadi pli da mono por ebligi aĉeton de ĉiu, varoj, kiujn oni kapblas produkti. Ili bone analizas la nunan ekonomion, la financon sistemon, difinas bonajn celojn : forigi mizeron, militadon, ke neniu estu sen vivrimedoj per dumviva rajtigado al Nacia Dividendo. Estas multe da bono en ĉiu, tiuj proponoj. Sed kiel oni povas ilin efektiviĝi ? Ĉu eblas tiom profunde reformi la nunan sistemon ? Laŭ mi, mankas kiel oni difinas la monunuan valoron. Por mi tio estas la plej grava problemo. Eble ni povus trovi solvon, baziĝante sur la Marksa teorio pri la interŝanĝa valoro. (Mi diris miajn ideojn en artikolo pri la ekonomiaj problemoj).

Ankaŭ la abundanoj proponas iom similan solvon. En sia propono por la distribua ekonomio, baziĝante sur la granda kapablo abunde produkti per malpli da laboristoj, ili diras, ke ne estas tolerebla, ke el tio rezultas forfeto de laboristoj el la laborado, kaj senigo de parto aŭ tuto el iliaj enspezoj. Ili proponas do, ke oni garantiu al ĉiu individuo socialan enspezon (Nacian Dividendon, ĉe la socikreditanoj). Pri la bankoj J. DUBOIN bone klarigis ilian funkciadon kaj la rolon de la bankkredito kiel mono. Diference kun la socikreditanoj, ili proponas konsummonon, kiu malaperas je la unua aĉeto.

Mi akordiĝas kun tiuj principoj, kun la atingotaj celoj. Pri la neceso modifi kelkajn proponojn, ĉefe pri la mono, mi ne same vidas la aferon. Necesus precizigi ankaŭ kiujn sociajn movadojn oni povus fidi. Ĉu ne necesus, ke la diversaj movadoj, kiuj havas proksimume samajn vidpunktojn, unuiĝu, bone studu kaj klare difinu kian novan estontan ekonomion ili celas ? Ankaŭ ke ili fariĝu pli agemaj, viglaj, pli partoprenu en la politika batalo ?

## NE AL LA NACIŜTATOJ :

Mi havas abonon ĉe "Pro Esperanto" en Vieno : oni sendas al mi ĉiujn novaperaĵojn, kun rabato. Ĉar la libroj eldonataj de "Pro Esperanto" estas ĝenerale valoraj, mi konsilas al la legantoj de **Laŭte**, kiuj interesiĝas pri E-literaturo, ke ankaŭ ili fariĝu abonantoj de "Pro Esperanto".

Inter la ĵus ricevitaĵoj libroj estas "**Kroata milita noktlibro**" de Spomenka Ŝtimec, kiun mi rekomendas al ĉiuj, kiuj ankoraŭ aliĝas al la interna ideo de Esperanto, kaj krome al tiuj, kiuj volas defendi la kristanajn valorojn.

En sia libro, Spomenka citas leteron de Zamenhof al la diplomatoj, en kiu la majstro alvokas "forigi tiun senfinan fonton de konstantaj bataloj, kiun prezentas la identigo de la lando kun la gento."

Mi per aliaj vortoj parolas pri la ligo inter ŝtato kaj nacio. Ke la celo de la ŝtato estas servi la nacion, jen principo, sur kiu baziĝas la franca juro ekde la franca revolucio. Tio estas unu el la bazaj principoj de la franca deklaro pri la rajto de viro kaj civitano (noto : mi intence skribas **viro** kaj ne **homo**, ĉar francaj civitaninoj ricevis voĉdonrajton en 1944).

Lanti, kiel bona franco, edukita en laikaj ŝtataj lernejoj, konfuzis ŝtaton kaj nacion. Pro la krimoj de la ŝtatoj, li volis elimini la naciajn kulturojn. Tio estas formo de barbareco.

Sed aliaj barbaroj volas elimini el ĉiu aparta ŝtato ĉion, kio ne apartenas al la ĝin reganta nacio, kaj pretas al ĉiaj krimoj por tiu celo.

Necesas do aserti, ke la homaro formas unu tuton, kiu devas esti solidara. La homaro devas trovi la manieron organizi sin kiel tuton, respektante la diversecon de siaj kulturoj, kiu estas fonto de intelekta riĉeco. En la nunaj interretaj militoj, oni rimarkas la konscian volon de militemuloj detrui, krom homaj vivoj, ankaŭ la kulturajn riĉaĵojn de la malamikoj, eĉ kiam ili estis internacie agnoskitaj kiel kulturaj valoroj de la homaro. La kultura diverseco estas bono por la tuta homaro. Oni do devas sekvi la konsilon de Zamenhof, kaj disigi la kulturalan nocion "nacio" de la jura organizado de la homaro.

Jacqueline Lépeix.

## DEMANDO AL G. LEBEC KAJ J. MANCEAU

Ĉu vi povas precizigi al ni, kiuj grandaj eklezioj, krom la katolika, kontraŭas al la uzo de kontraŭnaskrimedoj ?

J. Lépeix.

## NACIISMO ENE DE ESPERANTISTOJ

*Bona titolo por nomi la disputaĉon inter kelkaj esperantistoj pri la temo : Kie naskiĝis Esperanto ?*

*Vere, mi ne ŝatas partopreni en tiuj infanaj aferoj, sed la afero jam ripetiĝas en la lastaj numeroj de L! kaj mi volas esprimi mian opinion. Unue, mi diros ke, kvankam mi naskiĝis en Leono (urbo en regiono, kiu apartenas al la hispana ŝtato), mi ne sentas mir hispano. Mi estas nur homo.*

*Ĉu vere Esperanto naskiĝis en Polio ? Per alia demando mi respondas : ĉu vere tio gravas ? Se ne, lasu la disputon kaj laboru per kaj por Esperanto. Se jes, pensu : lingvo estas aĵo konstante evoluanta, oni povas scii nek kiam nek kie ĝi naskiĝis kaj evoluis. Pri Esperanto ni scias daton (1887-a), kiam oni eldonis la unuan broŝuron pri "**internacia lingvo**". Ĉu jam estis lingvo tiam, aŭ ĉu ĝi bezonis esti parolata por esti vera lingvo ? La unuaj personoj, kiuj parolis E-on, kiuj ili estis ? Ĉu poloj, ĉu aliuloj ?*

*Ĉu Esperanto naskiĝis el la cerbo de Zamenhof, aŭ naskiĝis per la praktikado de ĉiuj kiuj lernis ĝin ? Se ĝi naskiĝis nur el la cerbo de Zamenhof, ĝi estas juda lingvo, ĉar li estis judo. Sed se ĝi naskiĝis el la praktikado, ekestas problemo. Ni devas konstati la naciecon de la cent (aŭ de la ducent, aŭ...) unuaj geparolantoj por scii la naciecon de nia lingvo. (Ĉu nia ? Aŭ ĉu mi devas paroli pri pola, juda, rusa, germana ktp... lingvo ?) Kaj kiam ni scios tion... ho ! kia hororo ! ni scios, ke ni parolas ne internacian lingvon, sed nacian !*

*Alia demando, eĉ pli grava : Kie Zamenhof kreis Esp-on ? Kelkaj diras : en Polio. Bone, sed kie ? En kiu urbo ? En kiu kvartalo ? En kiu strato ? En kiu domo ? Bonvolu diri tion al mi ekzakte ! Kaj diru tion al la nunaj loĝantoj de tiu ĉi loko, por ke ili festu kaj solenu la gravan aferon Tio estas grava por Esperanto ! Kaj diru ankaŭ, ĉu Zamenhof pensis pri Esperanto ĉiam ĉe la sama ejo aŭ ŝanĝis siajn pensejojn, ĉar eble Zamenhof vojaĝis kaj dume lia cerbo*

ankoraŭ funkciis por Esperanto. Aŭ ĉu ne ? Povas esti, ke kiam li estis en Bulonjo ĉe maro por la unua Kongreso, li ne pensis pri Esperanto, ĉar tiu ĉi urbo ne estas en Polio. Vere grava demando...

Laste, nia amiko Ludoviko estis judo, kiu naskiĝis en Bjalistoko, urbo loĝata de rusoj, judoj, germanoj, litovoj, poloj kaj aliaj, sub la cara imperio. Nu, ĉu Zamenhof sentis sin judo, polo, germano, ruso aŭ aliulo ? Ĉu li kreis E-on por fierigi polojn, rusojn, germanojn ktp... ? Mi ĉiam kredis, ke Esperanto estis kreita por kunigi la homaron. Kia trompo !

Kaj pro kio tiu artikolo kaj la antaŭaj ? Ni ne havas aferon pli gravan ol tiu ĉi, ĉu vere ?

Por mi Esperanto naskiĝas, kiam kaj kie ĝi estas uzata, kaj apartenas al tiu, kiu ĝin uzas.

Mia patrio estas la mondo, mia familio la homaro.

**Nicolas Gil** (Nikolao Ĥil)  
Leon, la 17an de junio 1993a.

## RESPONDE AL KORBETO

(L:105, p.6/7)

Estimata Korbeto !

Kun granda intereso mi tralegis Vian artikolon dediĉitan i.a. al mi.

Verkinte mian artikolon "La naskiĝlando de Esperanto", mi eĉ ne supozis, ke ĝi (aŭ pli precize ĝia titolo) elvokos debaton. Vi pravas, ke la temo min kortuŝas (same kiel Vin), ĉar ni ja debatas pri historio de Lingvo Internacia. Viaj argumentoj estas trafaj kaj mi ilin komprenas. Mi bone konas la libron de Privat "Vivo de Zamenhof" kaj ankaŭ la de vi menciitajn citaĵojn. El la libro mi citos ankaŭ kelkajn vortojn de Ludoviko Zamenhof pri naciismo, kiujn eldiris Belmont dum la Zamenhofa enterigo :

"Ne venis Polujo kadavron honori

De filo pollanda, de monda saĝul'...

Ho kiel ŝanĝiĝis en mi pola kor'...

Malriĉaj Hebreoj nur venis post ĉerko

Ĉar mortis bonkora helpant' okulisto."

Tio klarigas, ke Zamenhof estis hebreo (laŭ gento), polo (laŭ naskiĝloko kaj vivo).

Mi ne volas pli longe disputi, ĉu Zamenhof sentis sin polo, ĉu ne. Iam

en Pola Televido mi rigardis programon pri homo, kiu laŭ gento estis hebreo, kaj kiu naskiĝis, laboris kaj loĝas en Pollando. Demandite, ĉu li sentas sin polo kaj ĉu li volus forlasi Pollandon kaj translokiĝi al Israelo, li respondis : "Sinjoro redaktoro, miaj gepatroj elektis Pollandon kiel mian patrujon, mi ĉi tie naskiĝis, mi ĉi tie laboras, mi ĉi tie loĝas kaj mi ĉi tie volas morti. Do mia patrujo estas Pollando kaj mi sentas min polo."

Responde al Via frazo "...Aŭ de personoj, kiuj timas al iuj malbonan reputacion de gento hebreo". Mi ne skribis pri tio. Mirigas min opinio, ke iu timas pri malbona reputacio ĝuste de gento hebreo. Ja ĝi estas nacio la sama kaj samvalora kiel aliaj. Hebreoj kaj poloj de ĉiam estas kunligitaj de historio kaj de moralaj interrilatoj. Tial mi ne komprenas Vian frazon.

Finante, mi ne konsentos kun Via opinio, ke la debaton semas naciisma stultaĵo. Domaĝe, ke Vi tion ne komprenas.

Bondezirante al Vi, kun elkoraj salutoj, kaj atendante Vian komprenon,  
**Remigiusz GRZELA**, en junio 1993.

P.S. Samtempe mi volas vere elkrei danki al Kristina Poreda pro ŝia reago.

## IOMETE PRI "KRIBO"

Mi devas konfesi, ke mi sciis pri la ekzisto de **Laŭte!**, kiam en la jaro 1986-a, pro hazardo, numero de la gazeto alvenis al miaj manoj.

Kia plezuro la legado de tiu publikaĵo ! Mi tuj konstatis, ke tie samideanoj kaj samideaninoj esprimadis tute libere kaj sen tabuoj ĉiajn temojn.

"Jen gazeto unika en Esperantujo!", mi diris al mi mem. Kaj mi abonis ĝin ; kaj se foje mi pagas la reabonon iomete malfrue, kulpas pri tio mia manko de memoro, kvankam, por diri la veron, kio mankas al mi estas dolaroj.

Sed ni lasu ĉi tiun banalaĵon !

Probable vi, gelaŭtuloj, vi vin demandas kial ĉi tiu artikoleto pri nia "direktoro", nome, pri Christian Baudé, kiu estas multe pli konata kiel "Kribo" ? Ĉar en la decembra numero (jaro 1991-a) de gazeto "Esperanto" oficiala informilo de UEA, mi povis vidi lian foton. Apud la foto oni legas : "Christian Baudé, kun la ĉarma Sabrina Redoulez, denaska Esperanto-knabino, kiu foje gajigas la Muelejon".

Nu bone, en tiu foto nia "direktoro" aspektas knabo ĝuanta libertempon ; eĉ lia rideto estas knaba rideto. Gratulojn, Kribo !

Tiu foto, tiu "Kribo" estis vera surprizo por mi, ĉar mi imagadis, ke li estas dikulo, senharulo kaj okulvitruo.

## FEK' AL ŜTATOJ ! VIVU LA POPOLOJ !

Mi proponas do, ke de tempo al tempo aperu sur la paĝoj de **Laŭte!** fotoj de la Muelejo kaj de ties loĝantoj kaj vizitantoj ; kaj se tiuj vizitantoj apartenas al la ina sekso, prefere ili aperu vestitaj per malmulttuka banvesto.

Mi petas de la laŭtulinoj ne kolereti kontraŭ mi pro tiu ĉi naiva peto, ĉar en nudeco estas neniam honto. Ĉu ni ne venis en la mondon nudaj ?

A. Lopez Luna.

Noto de la red.

La aperigon de tiu ĉi-supra "naivaĵo", ricevita jam komence de 1992, mi prokrastis preskaŭ du jarojn ! Mi tial petas pardonon de la verkinto. Ankaŭ de la ceteraj legantoj mi petas pardonon, pro tio ke la formulo de L! trudas al mi ĉion aperiĝi, inkluzive - ve! - de tio, kio riskas hirtiĝi miajn, tamen malmultiĝantajn, harojn. Al amiko Lopez Luna, tiam relative nova laŭtulo, mi pardonis, sed mi petas ke li estontece evitu uzi kontraŭ min vortojn "direktoro", "redaktoro" kaj similajn. Ĝuste tiajn plagojn celas eviti la formulo de **Laŭte!**

Ĉar la perletera intervjuo aperinta en "**Esperanto**" saĝnas al mi ankoraŭ nun ne tro maltrafe resumi la strebadon de **Laŭte** kaj la evoluon de la broŝurservo, mi intencas uzi ĝin en "reklamilo" por prezenti nian aferon al ne-laŭtuloj.

P.S. Bedaŭrinde, ne eblas bone represi fotojn en L! Se ne, kompreneble nenio malpermesus aperiĝi belajn nudaĵojn. Sed, amiko Lopez Luna, kial diable nur virinajn ??

\*\*\*\*\*

## GOJGUTO

Jonkvilojn junulin' etendas,  
Flavbrilajn ĉe la strat-angul'.  
Malfruo busa. Kelkaj plendas.  
Jonkvilojn junulin' etendas.  
Buked-en-mane mi atendas  
- Printempas jam en la okul'.  
Jonkvilojn junulin' etendas,  
Flavbrilajn ĉe la strat-angul'.

S. BONIOL

*Unue mi volas klarigi, ke mi estas liberecano, do senŝtatano, kaj tute ne kontraŭsemito, sed kontraŭcionisto. Cionismo estas, same kiel naziismo, dogmo de malamam kontraŭ la "diferenculoj". Tion mi volas klarigi, por ke oni ne nomu min propagandulo kontraŭ la judoj pro tiu ĉi reago al "LA ISRAELA AGRESEMO - ĈU REALO AU MITO ?", aperinta en L! n-ro 106.*

*Amiko Löwenkopf parolas prave pri la historiaj aferoj de Israelio, sed je unu nura flanko. Jen la kialo :*

*\* Vere la nazioj murdis amason da judoj, sed kial oni ĉiam forgesas la milojn da germanoj, rusoj, poloj, francoj, hungaroj, hispanoj ktp..., kiuj estis murditaj fare de la nazia armeo ? Mi povas paroli ankaŭ pri la miloj da viktimoj, kiuj mortis fare de la usona, sovetia, angla ktp... armeoj. Parolu ne nur pri viaj mortintoj, parolu pri ĉiuj, kiuj suferis dum tiu periodo.*

*\* Dum la brita okupado de Palestino ne nur la araboj organizis amasmurdaĵojn, Irgun kaj Stern-bando estis organizitaĵoj, kiuj ne nur luktis kontraŭ la brita armeo sed ankaŭ atakis senkulpajn personojn. Kion ili volis forviŝi per sango?*

*\* La arabaj ŝtatoj (ŝtatoj, ĉar ne popoloj) komencis multajn militojn kontraŭ Israelio, sed la israela armeo invadis Libanon kaj komencis suferegojn kontraŭ milojn da senkulpaj loĝantoj. Hodiaŭ la israela armeo ankoraŭ restas en Libano.*

*\* Teddy parolas pri paca kunvivado inter Israelio kaj Egiptujo, kia mito ! Ĉu vere oni povas paroli pri paco fondita, kaj subtenata, sur militoj, armeoj, atomarmiloj kaj porĉiamaj minacoj ? Ĉu ni povas kredi, ke sen la apogo de Usono Israelio rezistos atakon de siaj najbaroj ? Estas naivaĵo kredi, ke la arabaj landoj volas lasi pace Israelion kaj ke tiu estas preta ĉirkaŭbraki siajn (mal)amikojn. Post siaj ridetoj ĉiuj pretigas la ponardojn.*

*\* "La palestinanoj estas viktimoj de siaj senprudentaj, neflekseblaj gvidantoj". Diru tion al la geknaboj, kiujn murdas la israela armeo, diru tion al iliaj patrinoj. Kaj ĉu la israelianoj ne estas viktimoj de siaj gvidantoj ? Ĉu la israelaj*

gvidantoj estas puraj, senmakulaj personoj ? Se jes, jam antaŭ multaj monatoj kaj jaroj la sango de la israelianoj kaj palestinoj ne makulus la teron de tiu bela lando.

\* Mi memorigas, ke la israela ŝtato ankoraŭ ne akceptis la UNO-rezolucion, kiu ĝin devigas redoni al Sirio la alteben-aĵojn de Golan. Mi memorigas ankaŭ, ke kiam oni deklaris rezolucion kontraŭ la iraka (faŝisma) ŝtato kaj tiu ĝin rifuzis, oni pretigis tuj grandskale militisman reagon. Se la iraka ŝtato devas akcepti la rezolucion, kial ne la israela ŝtato ?

\* Mi ne fidus je la ŝtato, nek je la registaro, kvankam tiu estas "sincere pacema". Ho fi ! Kiam registaro estis sincere pacema ? Tion same diris nazioj antaŭ ol ataki Ĉeĥoslovakion kaj Polion, kaj la hispanaj faŝistoj antaŭ la puĉo de 1936a, kaj Saddam antaŭ ol invadi Kuvajton, kaj... ĉiuj, kiuj havas armilojn kaj volas trudi siajn vidpunktojn kaj dezirojn al la aliaj. Ŝtato, kiu subtenas armeon, neniam estos "sincere pacema", kaj pro tio, ke la ŝtatoj nepre bezonas armeon por ekzisti, neniu el ili estos pacema.

\* Neniun mi volis ĝeni, sed mi kredis bezonata voĉon je la alia flanko. Mi respektas la mortintojn dum la hitlera erao, pro tio mi reagis kontraŭ tiuj, kiuj murdas enmigrintojn en Hispanio, enmigrintojn en Germanio, popolanojn en Bosnio, indiĝenojn en Brazilio, palestinanojn en Palestino, ktp...

Ĉu ni iam lernos... ?

**Nicolas Gil** (Nikolao Ĥil)  
Leon, la 17an de junio 1993a.

## GRILTRILO

Sur la kamparo trilas grilo.

Julias. Nokto malhelblua.

Dum terodormo, ĉi jubilo :

Sur la kamparo trilas grilo.

Laŭdkantas Dion en humilo

l'etulo sub ĉiel' velura.

Sur la kamparo trilas grilo.

Julias. Nokto malhelblua.

**S. BONIOL**

(komplemente al tio aperinta en L!104)

## Nicole DÉJEAN :

Ne plu eblas ignori, ke homaro vole nevole estas solidara. Ne plu eblas al privilegia minoritato trovi rimedojn nur por si, sen endanĝerigi sin : eksploda kaj ne longtempe elten-ebia estas la nuntempa homara situacio.

Ludoviko (vd.L!104) tre bone klarigis tiun gravan zorgon kaj proponis raciajn, saĝajn solvojn.

Demografio forte dependas de socia, ekonomia vivnivelo sed ankaŭ de kulturo. Estas facile trovi radikalajn solvojn parole aŭ skribe, kiam oni estas je la flanko de la "privilegiuloj" eĉ sincere sindonemaj, bonvolemaj, kompatemaj. Kuraĝuloj elĉerpas siajn fortojn sub la kreskanta amaso da mizeruloj, kiujn ili helpas.

Kion fari ? Ĉu estas universalaj solvoj ?...

Estas du ĉefaj aspektoj pri demografio : la individua, humana, kaj la socia. Kiel individuo, homo devas rajti libere naski aŭ ne, libere elekti kiom da... Estas rajto. Kiel socia membro, homo devigas sin respondi pri la vivrimedoj, la edukado de siaj infanoj : Estas devo.

Nur por "bonŝanculoj" tiu rajto kaj tiu devo ne estas kontraŭdiraj kaj efektivaj, ĉar la materia kaj la kultura vivniveloj estas tiom malaltaj, tiel mizeraj en tiom da landoj en la mondo ! Tiom da homoj postvivas ! Por ili temas pri rajto dece vivi, sendepende de sia raso, de sia etno, de sia socia klaso.

Al la solvoj proponitaj de Ludoviko (klerigado, alporto de sciencaj kaj teknikaj rimedoj, naskpreventado) mi aldonas, ke ankaŭ estas nepre necese ŝanĝi mondscale la ekonomian sistemon, kiu premas tiom da landoj, krei vere demokratecajn ŝtatojn kun internaciaj instancoj vere potencaj, kies celo estos efektivigi la homajn rajtojn en la mondo.

Konklude, pli praktike, je mia tre modesta situo, kion fari ? Min klerigi, provante klerigi aliulojn ; politike, socie agi ; esti kuraĝa kaj malavara ; ĉiam esti respondeca kaj konsekvenca... neniam rezigni...

## GBEGLO Koffi :

La 30an de aŭgusto 1993 mi triafoje en la monato iris en ĉefurbon Lome de nia Togolando. Mi profitis la okazon, kiel

kutime, por malfermi mian poŝtkeston. Inter ok poŝtaĵoj, kiujn mi trovis en la kesto, estis ankaŭ koverto C4 kun N. DÉJEAN kiel nomo de la sendinto.


Tiu nomo estas fremda al mi : mi tuj malfermis la koverton. Ha! temas pri ĉenletero de **Laŭte!** Mi rigardis la

datojn de la koverto kaj aldona letereto de DÉJEAN : 20a kaj 19a de novembro 1992. Kial la sendaĵo povis tiom malfrui kaj kial mi ne loĝas plu en ĉefurbo Lomé ?

Certe multaj Laŭtuoj jam scias pri la politika krizo, kiu skuas Togolandon de pli ol du jaroj. Ĝenerala striko komenciĝis la 16an de novembro 1992 kaj ĵus finiĝis la 1an de aŭgusto 1993. Dum tiu strika periodo okazadis nehomaj eventoj en la lando : la nacia armeo la loĝantojn de la ĉefurbo masakradis. Togolandanoj estis do devigataj forlasi la ĉefurbon por eviti mortpafon. Iuj migris al najbaraj landoj, dum kelkaj en vilaĝojn togolandajn. Miaflanke, mi kaŝas min en mia naskiĝvilaĝo, de kie mi jam sendis kontribuojn al **Laŭte**, kaj nun senhezite, kvankam malfruege pro striko en la lando, daŭrigas la 41an ĉenleteron, kies titolo estas : DEMOGRAFIO.

Ludoviko parolis pri demografio en la senco de homplimultiĝo. En sia artikolo li menciis problemojn de la senbrida demografio kaj proponis solvojn. Ĉu ankaŭ mi provu diskuti ?

Demografio en si mem ne estas problemo ; sed ĝia senbrideco naskas problemojn, al kiuj trovi solvojn estas inde. Tio estas la ideo de la artikolo de Ludoviko. Jes, tagon post tago homoj pli kaj pli multiĝas sur la tero. Al mi ŝajnas, ke ni, teranoj, konscie-nekonscie observas diron de la dio de la biblio, kiu ordonis al la unuaj homoj, ke ili plenigu la teron per siaj idoj. Ĉu tiam tiu dio pensis, ke problemo fontos el senbridiĝo de la homplimultiĝo ? Mi scias, ke biblioamantoj havas buntajn argumentojn por konvinki, ke kiom ajn multos la homoj sur la tero, la dio mem prizorgos ĉiujn. Ludoviko trovis, ke en iuj regionoj de la tero, la senbrida demografio estigas



nenombrebajn suferojn ; malsaton, malsanojn ktp., kiuj povas eĉ konduki la homojn al morto. Ĉu morto en si mem estas io bona/malbona ? Ĉu morti fruaĝe estas preferinde al morti multaĝe ? Jen demandoj, kiujn ĉiu siapense respondu.

La mondo, en kiu ni vivas, havas ekvilibron, ĉiam tenatan de ĉio en ĝi estanta : homoj, bestoj, montoj, arboj, riveroj, maroj, nuboj ktp. Ĉiutage la mondo devas eviti kolapson pro rompiĝo de sia ekvilibro. Ĝi do ĉiel klopodu por konservi la ekvilibron. Kiam ekzemple naskiĝas homo, al mi ŝajnas, ke tiam la mondo evitas kolapson, kiu estas okazonta, kaj kiun la nasko de la homo tuj tuj evitigas. La samo okazas ĉe la morto de homo, ĉe tertremo, ĉe elradikiĝo de arbo, ĉe politikaj malordoj en la mondo ktp. Do kiom ajn multos la homoj sur la tero, tio neniel devus esti ia danĝero por la homoj kaj la mondo. Tamen, ni homoj havas aliajn okulojn por rigardi la mondon. Tiuj okuloj ebligis al Ludoviko trovi, ke homoplimumultiĝo naskas suferojn.

Homoj venas en la mondon ne kiel pluvo, sed en formo de io pensanta. Ni, homoj nuntempaj, kun la okuloj de Ludoviko, havas taskon : "Eduki la infanojn, kaj vi ne punos la adoltojn". Ni ĉiel klopodu por certigi la subtenon al nia idaro. Ni nask(ig)u gefilojn, palpinte niajn poŝojn kaj personecon : ĉu ni kapablas kontentigi ĉiajn necesajn bezonojn de niaj gefiloj ? Ĉu ni estas bona ekzemplo por homo ? Ĉu mi kapablas ĉiel eduki miajn gefilojn ? Kiom da gefiloj miaj poŝoj kaj personeco ebligas/permesas al mi eduki ? Jen kelkaj el la multaj demandoj, kiuj helpas nin bone prizorgi la idojn, kiujn ni nask(ig)os.

Ĉu ĉieaj homoj pensas pri tiaj problemoj ? Ludoviko parolis pri iuj regionoj. Li do jam menciis, ke homoj kiom/kiel ajn tiom/tiel ili volas, naskas. Jen do aperas antaŭ ni SENBRIDA DEMOGRAFIO kun siaj kuntrenataj suferoj. Reirante al la ĉefartikolo de Ludoviko, mi diru, ke :

- La titolo estus, ne nur DEMOGRAFIO, sed SENBRIDA DEMOGRAFIO.

- Ĉiu homo nask(ig)u tiom da fil(in)oj, kiom ĝiaj poŝoj kaj personeco permesas/ebligas. Al mi ŝajnas, ke tiu rimedo povas regi la demografion, kiom ajn alta ĝi estas.



**Laŭtulo Aiph. JACQUEL** informas pri la dua eldono de sia franclingva verko "Toute la vérité sur notre existence terrestre - Le retour en Eden". 245-paĝa volumo mendebla al la aŭtoro : A. Jacquel, 61 av. Jules Vallès, F 38400 ST MARTIN D'HERÈS. 90 FF por esp-istoj, inkluzive de la afranko. Tiu pamfleto majstre montras, ke la homo estas viktimo de la plej grandega mistifiko el ĉiuj tempoj, kaj ke ĉiu ajn ideologio celas nur plu teni la homon en sklaveco... La konkludo de A. Jacquel estas, ke la timo estas la plej grava malamiko de la homo.

Okaze de la 30-jariĝo de sia E-agado en Madagaskaro, nova tiea laŭtulo Désiré RABEVAZAH, BP.3171, ANTANANARIVO, proponas jenajn verkojn :

- Kono pri Madagaskaro (en esp.) kun riĉenhava teksto tre interesa por eksterlandaj esp-istoj ... 40 FF
- trilingva vortlisto (franca/malagasa/esperanto)... 30 FF
- himno, **La Espero**, en malagasa lingvo... 5 FF

Ekde po 5 ekz. ĉiu mendanto ricevas unu sepagan. Mendu pere de **Laŭte**.

La 3a numero de **ROK-GAZET** ĵus aperis. Ĝi atendas vin. Ĉi-foje sur 32 paĝoj, la enhavo abundas je roknovaĵoj. Nova serio per tiu ĉi numero komenciĝas.

Abono kostas 100 FF kaj validas por 4 numeroj. Adreso :  
EUROKKA Esperanto-Rok-Asocio, F-31450 DONNEVILLE.

JAM DE LONGE  
LA RADIO-AKTIVECO  
IGNORAS  
LA LANDLIMOJN !

## Impresoj pri ICEM-renkonto 1993 en Pardubice

Unuafoje mi partoprenis tian renkonton kaj, malgraŭ tio ke mi ne estas instruisto, tre ege interesis min la Freinet-pedagogio.

Estis preparita vere riĉa programo, eble iom tro riĉa. El la multaj kaj interesaj vizitoj, kiujn ni faris dum la dektaga daŭro de ĉi tiu renkonto, mi dezirus mencii almenaŭ tiujn, kiuj aparte ege plaĉis al mi.

La unua estis vizito al malnova parto de urbo Pardubice. Tie estas mirinda Pernštejna placo, kiu estas ĉirkaŭita de belaj domoj kun koloraj fasadoj, konstruitaj en malfrua gotika stilo. Rimarkinda el tiuj ĉi konstruaĵoj estas urbodomo, belega, en baroka stilo.

Vizito de la infanĝardeno logis min pro la granda spaco kaj la ludiloj je dispono de la infanoj. Sed la nuna politiko planas iom post iom fermi la sekciojn por infanoj inter 6 monatoj kaj 3 jaroj, ĉar oni konstatis, ke infanoj pli bone evoluas estante hejme minimume ĝis sia 4-a jaro. Por instigi patrinon resti hejme kaj zorgi pri infanoj anstataŭ labori en oficejo, fabriko, ktp., la patrinon ricevas specialan monsubtenon.

La dua vizito estis en lernejo por handicapaj infanoj. Dum la komunista reĝimo ili estis iom flankelasitaj. Nun, de post la velura revolucio, oni daŭre kreas specialajn lernejojn por ĉi tiuj infanoj. Ofte tiuj lernejoj ekestas de la iniciatoj de gepatroj, kiel okazis en la kazo de tiu ĉi vizitita lernejo. Lernejo ricevas monsubtenon de la registaro kaj de kelkaj lokaj entreprenoj.

La subĉiela etnografia muzeo en la Gaja monteto tre plaĉis al mi. Tie staras apud jam ekzistantaj malnovaj kamparaj domoj ankaŭ aro da konstruaĵoj tranlokigitaj ĉi tien el apudaj vilaĝoj. Oni povas citi ekzemple muelojn, ŝafejon, grenejon ktp. En ĉiuj domoj estas meblaro, manĝilaro, vestaĵoj, ĉiuj kutimaj iloj por normala vivo kaj por labori en la kampoj. Tiel oni povas vidi kaj ekkoni kiel homoj vivis en pasinteco en ĉi tiu regiono.

Mi admiris la kastelon Hrádek u Nechanic, unu el la plej gravaj en Bohemio. Ĝi estis konstruita en gotika stilo. La posedanto deziris elvoki impreson, ke ĝi estas mezepoka aristokrata loĝejo. Oni konstruis ĝin inter la jaroj 1841 kaj 1854. Interne la kastelo estas ornamita per arkitektaj elementoj, mebloj, ceramikaĵoj, vitraĵoj ktp., kiuj estis kolektitaj en ĉiuj flankoj de Eŭropo kaj de diversaj epokoj.

La vizito al elementa lernejo estis ege interesa. Ni konstatis, ke la lernejo estas tre bone ekipita, la infanoj havas ĉion necesan por lernado en

la plej bonaj kondiĉoj. La knabinoj havas eblecon lerni kuiradon en granda ĉambro, kie estas pluraj kuirfornoj same kiel la plej modernaj kuirhelpiloj por miksi, tranĉi ktp. La knaboj lernas labori kun ligno kaj meta'lo laŭ sia aĝo en laborejoj, kie ili havas ĉion necesan, ne rajtante uzi nur elektrajn ilojn kaj borilojn, tranĉilojn ktp. Tiujn rajtas uzi nur plenkreskuloj. Tiu ĉi lernejo estos baldaŭ 100-jara kaj antaŭ nelonge estis tute renovigita.

Laŭ mia opinio, estas unikaĵo la Bellehemo en urbo Trebechovice. La Bellehemo prezentas naskiĝon de Jezuetoj per kelkaj dekoj da lignaj figuroj - ŝafistoj, ministroj kaj ĉiuj metiistoj. La figuroj moviĝas sur scenejo kelkajn etaĝojn alta. Temas pri verko de simpla kampano, kiu lernis prilabori lignon kaj tiel realigis sian multjaran revon. Por ĉi tiu laboro li bezonis plurajn jarojn kaj la rezulto estas grava artaĵo.

La kultura amuza posttagmezo organizita de esperantistoj de la klubo de D-ro Schulhof en Pardubice enhavis vere riĉan kaj varian programon. Inter multaj eroj de ĉi tiu programo mi dezirus speciale menciigi la skeĉojn kaj kantojn luditajn de ĉeĥaj kaj francaj E-infanoj en Esperanto, la folkloran grupon KARMAZÍN, kiu ludis famajn popolajn kantojn kaj dancojn de Ĉeĥio kaj la magiiston, kiu vere amuzis nin per siaj interesaj magiaj ludoj.

#### RIANTO

\*\*\* \*\*\*\*\* \* \*\*\* \*\*\*\*\*

#### NI RICEVIS :

\* De laŭtulo kaj AVE-ano W. Gunther 32-paĝan broŝuron :  
**Esperanto - Internacia lingvo por monda demokratio kaj sana medio.**

Tiu nova kontribuo de D-ro W. Gunther al ekologio per esperanto\* "liveras faktojn kaj pripensojn... pri la ekologia memvaloro de Esperanto. Fone de la progresintaj detruoj en la biosfero la politikaj decidoelitoj komencis determini ankaŭ ekologie ia demokration kaj la konstitucian ŝtaton, kun fundamentigas ĝin. Simila evoluo estas prezentata kaj postulata por la idento de Esperanto mem kaj aparte por ties aplikado kadre de oficialaj organizaĵoj. La moderna industrisocio kun siaj detru(em)aj ekonomi-politikaj normoj ankoraŭ estas nepova fari la ununure taŭgan kaj urĝan por la konservado kaj evoluo de la biosfero kaj de la homaro : la konsekvenca enkondukon de sundevenaj energioj. Internacia lingvo, kiu restas en la postondo de tiaj deficitaj pensado kaj agado, kunkulpas pri la detruoj..." (laŭ resumo akompananta la broŝuron). Tre interesa teksto, foje en ne facila Esperanto, sed la enhavo indas iom peni. Adreso : EKOMED, Schulstr.7, D-34292 Ahnatal.

\* Disponebla ankaŭ : "Ekologio - ĉu ideologio ?" (ĉe SAT-BS, 3 FF)

## FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO de Petro USPENSKO (OUSPENSKY) (resumpecoj)

13

DU GRANDAJ ERAROJ EN LA POPULARA ENFOKUSIGO DE LA RELIGIO (Resumpecoj el la 15<sup>a</sup> ĉapitro)

1<sup>a</sup> La homo ne komprenas ke la religio dependas de lia nivelo de esto, nome, la religio estas relativa koncepto. La religioj respondas al la nivelo de esto de homo... kaj estas 7 malsamaj niveloj!

Sekve, la religia formo, kiu konvenas al unu, ne estas nepre tiu, kiu adaptiĝas al la necesoj de alia persono. Tial la homoj ne akordiĝas koncerne al la eksteraĵoj ornamoj de religio.

2<sup>a</sup> La homo ne komprenas ke la religio estas FARI, nome, ke li devas travivi kaj speguli ĝin en siaj agoj, ne nur pensi pri ĝi, ĉar se liaj agoj kontraŭdiras kion lia religio petas, li ne rajtas aserti ke li apartenas al ĉi tiu religio.

La plejmulto el la personoj, kiuj nomiĝas kristanoj, ne rajtas je ĉi tiu titolo, ĉar ili ŝajnas eĉ ne suspekti ke la ordonoj devas esti obeataj. La kristana religio malpermesas la murdon, tamen la sacerdotoj benas la kanonojn, kaj la fideluloj iras al la milito!

Neniu rajtas nomi sin kristano, se li ne plenumas la maksimumojn de Kristo. Por esti kristano ne sufiĉas deziri tion, necesas la kapablo esti tia!

#### ĈU PREĜADO POVAS HELPI HOMON ESTI KRISTANO?

Estas 3 tipoj de preĝoj: de peto, de ripeto, kaj personaj preĝoj. (Novaj, por propra uzo.)

La preĝo de subjektivaj homoj (nome, 1, 2, 3) povas doni nur subjektivajn rezultojn. Per siaj preĝoj, tiaj homoj sin konsolas, sin sugestias, sin endormigas. Tia preĝado ne povas doni objektivajn rezultojn ĉar ĝi devenas de la memhipnoto.

#### ONI DEVAS LERNI PREĜI!

Por atingi objektivajn rezultojn, 1-e oni devas lerni preĝi kaj sin koncentri en adekvata formo, pripensante ĉiun vorton, ĉar kontraŭe la preĝo perdas sian efikon,



sian tutan signifon, se oni recitas ĝin meĥanike.

La malfacilaĵo ŝuldiĝas al la malsamaj mioj: unu mio volas, la alia, ne; -ĝi volas kaj ĝi ne volas-, jeso k neo, pozitiva kaj negativa. Al ĉi tiuj mioj, oni devas oponigi sian propran MION (ligitan al la celo de l' psikologia laboro pri si), nome, enkonduki la 3-an forton kaj ekvilibrigi aŭ harmoniigi la 2 kontraŭajn fortojn. Kaj se oni sentas ke oni vere deziras ĝin, do, tia preĝado povas atingi rezultojn.

Same, homo povas preĝi: "Mi volas memori pri mi!", nome, provi memori kion li ĉiam forgesas! Lia tuta vivo transformiĝus se li povus memori pri si!!! La tuta malbono venas de liaj forgesoj!!!

LA ĜENERALA NESICIO PRI LA KRISTANISMO - LA KRISTANA EKLEZIO ESTAS SKOLO - EGIPTUJO KAJ ĜIAJ LERNEJOJ DE RIPETADO.

Ekzistas ĝenerala nescio pri la kristanismo. Ekzemple, la templo kaj ĝiaj ritoj. Kie ili originis? Estas homoj kiuj diras ke oni prenis ilin el la paganoj kaj el la hebreoj, aŭ ke ilin elpensis la Pastroj de la Eklezio. Sed ĉio ĉi tio estas falsa.

La Kristana Eklezio estas skolo, pri kiu oni jam ne scias ke ĝi estas skolo. La kristana formo de l' kulto devenas el Egiptujo, sed ne de la konata Egiptujo, sed el nekonata Egiptujo. Ĉi tiu Egiptujo estis sur la sama loko kie la alia, sed ĝi ekzistis multe da tempo antaŭe. Tial oni rajtas nomi ĝin Pra-Egiptujo. Nur sen signifaj restaĵoj postvivis (en la historiaj tempoj) k estis konservataj sekrete. Ĉi tiu prahistoria Egiptujo estis kristana plurajn milojn da jaroj antaŭ Kristo, nome, tiu religio baziĝis sur la samaj principoj, la samaj ideoj de l' vera kristanismo.

En ĉi tiu Pra-Egiptujo estis specialaj lernejoj, nomataj: "Lernejoj de ripetigo", aŭ "Temploj de ripetigo", kie oni instruis la sciencojn kiuj pritraktas la universon kaj la homon, en "ciklo de ripetigo". En difinitaj tagoj, ĉi tiuj "ripetigoj" fariĝis kun soleno, kaj ili havis simblan sencon. La diservoj aŭ mesoj inkludis sanktajn dancojn, kiuj poste restis ekskluditaj el la kristana kulto. Ĉi tiuj lernejoj de ripetigo taŭgis

kiel modelo al la kristanaj preĝejoj. La preĝoj, himnoj, responsorio: Ĉio havis propran sencon en ĉi tiuj ripetigoj, same kiel la festoj kaj ĉiuj religiaj simboloj, sed ilia signifo perdiĝis antaŭlonge!

KIE RESONAS (EN ONI) LA VORTO "MI", KIAM ONI LAŬTE EL-PAROLAS ĜIN?

Ekzercu vin. Celo de ĉi tiu ekzercu estas senti sian MION, kiam oni pensas pri si mem, kaj por transigi sian MION de unu centro en alian.

ĈIU VERA RELIGIO KONSISTAS EL DU PARTOJ:

La 1<sup>a</sup> instruas tion KIO DEVAS ESTI FARATA.

La 2<sup>a</sup> instruas KIEL FARI kion instruas la 1<sup>a</sup> parto, kiel fari tion kio devas esti farata.

Ĉi tiu 2<sup>a</sup> parto (nevidebla aŭ sekreta) ekzistas en la Kristanismo same kiel en ĉiuj aŭtentikaj religioj, kaj ĝi instruas KIEL sekvi la maksimumojn de Kristo kaj kion ili signifas!

LA ORGANIKA VIVO SUR LA TERO

La organika vivo sur la tero estas ĉenero nemalhavbla en la ĉeno de mondoj (unu elemento ne povas ekzisti sen la alia); ĝi transsendas al la Tero la planedaran influon k nutras la lunon, ebligante ĝian kreskon. Sed ankaŭ la Tero kreskas, ne laŭ la volumo, sed laŭ la konscio kaj percepteco; ĝi bezonas pli subtilajn influojn. Kun ĉi tiu celo la organika vivo devas evolui por kontentigi la necesojn de l' planedoj, de la Tero k de la Luno.

KRESKO DE L' RADIO DE KREADO - LA LUNO

La Radio de Kreado estas branĉo kiu kreskas (kiel arb branĉo). La kresko de la Luno dependas de la organika vivo sur la Tero, do, la kresko de l' Radio de Kreado dependas de la organika vivo sur la Tero. Se la organika vivo haltas en sia disvolviĝo, en sia evoluo, la branĉo povas sekiĝi.

Siavice, en la organika vivo (en evoluo) estas histoj kiuj evoluas kaj aliaj kiuj taŭgas kiel manĝaĵo k kiel

medio, kaj egale, en la histoj (en evoluo) estas ĉeloj kiuj evoluas kaj aliaj kiuj taŭgas kiel manĝaĵo kiel medio, kaj en ĉiu ĉelo (en evoluo) estas partoj, kiuj evoluas kaj partoj, kiuj taŭgas kiel manĝaĵo kaj kiel medio.

La parto de la organika vivo, kiu evoluas, estas la homaro. Se la homaro ne evoluus, tio signifus ke la evoluo de la organika vivo haltus, kaj sekve ankaŭ haltus la kresko de l'Radio de Kreado.

### ŜANĜOJ EBLAS NUR EN LA "VOJKRUCIĜOJ".

Laŭ la leĝo de oktavo, procezo ne povas esti modifita laŭvole en kiu ajn momento; ĝi povas esti modifita en iuj "vojkruciĝoj", kaj se en unu el tiuj vojkruciĝoj nenio okazas, nenio fariĝas; la procezo daŭrigas sian disvolviĝon laŭ meĥanikaj leĝoj. (Kaj eĉ se ĝi iras al totala detruo, nenio fareblas).

La vojkruciĝoj respondas al la intervaloj MI-FA kaj SI-DO (en la oktavo).

La Intelektaj Teorioj lokigas la homon en la centron de ĉio, kvazaŭ ĉio ekzistus nur por li (steloj-Suno-Tero-Luno); ili forgesas pri la efemera ekzistado de l'homo, pri lia nuleco, kaj pri la sekundara rolo kiun ludas la homo kaj la organika vivo en la kosma procezo!

Krome la teorioj nomataj "egaligaj" kaj "humanaj" estas tute nerealigeblaj (kaj se ili realiĝus, ili estus fatalaj).

Ĉio en la naturo havas celon kaj sencon: tiom la malegaleco de l'homo kiom lia suferado. Detruu la malegalecon estus detruu ĉiun eblecon de evoluo!! Detruu la suferadon ekvivalentus detruu tutan serion de perceptoj por kiuj la homo ekzistas, kaj krome ĝi ekvivalentus detruu la "ŝokon", nome, la solan forton kapablan ŝanĝi la situacion.

LA PROCEZO DE EVOLUO CIAM KOMENCIĜAS PER LA FORMIĜO DE KONSCIA KERNO.

Estas kompleta analogio inter homaro kaj homo. La procezo de (ebla) evoluo por la homaro estas analogia

al la procezo de (ebla) evoluo por la individua homo.

Kaj ĝi komenciĝas en la sama maniero: iuj ĉeloj iom post iom fariĝas konsciaj, kaj ariĝas; ĉi tiu grupo al-tiras aliajn ĉelojn, subordigas aliajn, kaj la tuta organismo estas direktata de ili.

Nome, ke por la homaro, same kiel por la homo, ĉiu evolua procezo komenciĝas per la formiĝo de ĉi tiu konscia kerno en la homaro, same kiel la meĥanikaj kutimoj, gustoj kaj malfortaĵoj batalas en la homo kontraŭ la konscia Memoro pri si.

### ĈU LA HOMARO EVOLUAS?

Ĉu ni rajtas diri ke la vivo estas regata de grupo de konsciaj homoj?

En la 2 lastaj mondmilitoj, ni povis konstati ke la vivo estas en la povo de la plej nekonsciaj, kaj de la plej profunde "dormantaj"!

Anstataŭ vidi la homan inteligenton brili, ni vidis la stultecon regi en ĉiuj siaj formoj.

Kaj anstataŭ serĉi la unuecon aŭ la pacigan kaj harmonian unuiĝon, (preterpase dirite: kun l sola lingvo, -Esperanto-, kaj l sola monda monunuo) ni vidis novajn malamikecojn, novajn miskomprenojn.

Ŝajne do la homaro ne evoluas. Pli ĝuste, se ni komparas la homaron kun homo, ni konstatas kreskon de la Personeco je kosto de la Esenco; nome, kreskon de tio artefarita, nerealita, kio ne estas nia, je kosto de tio natura, reala, kio estas vere nia.

Samtempe, ni konstatas kreskon de aŭtomatismo. La homoj transformiĝas en robotojn, en dent-radaron de maŝinoj. La homo (kolektive parolante) transformiĝas en volontan sklavon.

Tamen, en la lastaj tempoj (jardekoj 70<sup>a</sup> kaj 80<sup>a</sup>) manifestiĝas iuj signoj, iuj inklinoj al la (ekonomia) unuiĝo Eŭropa!, per kio ŝajnas konkretiĝi la aliro al supera nivelo de konscio, la kontinenta aŭ internacia konscio. Laŭ ŝajne, grupo de konsciaj homoj direktas la homaron kvankam ili ankoraŭ estas malmultaj por influi en decida maniero.

## LA 3 INTERNAJ CIRKLOJ DE L'HOMARO KAJ LA EKSTERA CIRKLO

La vivo de l' homaro ricevas du klasojn de influoj: Planedaran influon meĥanikan (ricevitan nevolonte kaj nekonscie), kaj la influon de la 3 internaj cirkloj de la konscia homaro.


LA 3 INTERNAJ CIRKLOJ ESTAS: 1.LA ESOTERA CIRKLO, 2.LA MEZOTERA CIRKLO, kaj 3.LA EKZOTERA CIRKLO.

LA ESOTERA CIRKLO: Konsistanta el homoj kiuj posedas la individuecon, -permanentan MION-, liberan Volon, sen-dependecon, kompletan kontrolon de siaj statoj de konscio, la tutan alireblan scion, la plenan komprenon, kaj kiuj estas mastroj de si mem.

LA MEZOTERA CIRKLO: Egala al tiu esotera, sed la scio estas pli teoria. Plena kompreno.

LA EKZOTERA CIRKLO (Ekstera cirklo de la interna parto) Kosma scio da pli filozofia, pli abstrakta karaktero ol la scio de l' mezotera cirklo. Plena kompreno.

Ekster ĉi tiuj 3 internaj cirkloj de l' homaro troviĝas LA EKSTERA CIRKLO: Meĥanika homaro kiu ne komprenas sin reciproke: ĉiu komprenas laŭ sia maniero.



Kutime, oni parolas nur pri 2 cirkloj:

- |  |          |
|--|----------|
| 1. INTERNA (ESOTERA) CIRKLO (KONSCIA), kaj:                | } HOMARO |
| 2. EKSTERA (EKZOTERA) CIRKLO (MEĤANIK) (=la ordinara vivo) |          |


LA 4 "VOJOJ" KVAZAŭ 4 PORDOJ KIUJ MALFERMIĜAS AL LA EKSTERA CIRKLO DE L' MEĤANIK HOMARO.

LA 4 "VOJOJ" ESTAS:

- 1<sup>a</sup> La vojo de l' fakiro.
- 2<sup>a</sup> La vojo de l' monaĥo.
- 3<sup>a</sup> La vojo de l' jogano.
- 4<sup>a</sup> La vojo de l' sagaca homo.

La 1<sup>a</sup> vojo estas tiu de la homoj 1 (fizika) KORPO  
 La 2<sup>a</sup> vojo estas tiu de la homoj 2 (emocia) KORO  
 La 3<sup>a</sup> vojo estas tiu de la homoj 3 (intelekta) MENSO  
 La 4<sup>a</sup> vojo estas tiu de la homoj 4 (spirita) SPIRITO

LA 4 "PORDOJ"



Ĉi tiuj 4 pordoj respondas al la 4 vojoj (fakiro, monaĥo, jogano kaj sagaca homo). Ilia komuna bazo estas la religio.

La 4<sup>a</sup> VOJO malsamas de la aliaj tri, ĉar ĝi neniam estas permanenta; ĝi ne havas difinitan formon, kaj ne estas institucioj ligitaj al ĝi; ĝi aperas k malaperas laŭ propraj leĝoj; ĝi povas alpreni variajn formojn kaj havi malsamajn sencojn.

#### SPECIALA SIGNIFO DE LA VORTO 'VOJO'.

La VOJO estas la transformo kiu kondukas homon el la Ekstera Cirklo (de la meĥanika homaro) en la internan Cirklon (de la konscia homaro). La 4<sup>a</sup> vojo havus nenium signifon, se ne ekzistus Interna Cirklo al kiu ĝi kondukas.

#### LA ESOTERAJ LERNEJOJ DE ORIENTO:

La tibetaj lernejoj havas formon de 4 koncentraj cirkloj. La hindaj lernejoj havas formon de 4 kvadratoj (unu en aliaj).

LA INTERNA CIRKLO (DE L' HOMARO) estas ne nur fonto de novaj kaj potencaj ideoj, kiuj eventuale ŝanĝos la direkton de la homa pensado, sed ankaŭ generatoro de energio de la plej alta nivelo.

GURDIEFO firme asertis ke la rolo de la homoj sur la Tero, estas tiu de "aparatoj" por transformi energion; ke iuj energioj, kiujn la homoj devas produkti, estas postulataj por kosmaj celoj, kaj ke la homoj komprenantaj kiel oni produktas tiujn energiojn, estas la solaj kiuj vere plenumas la celon de la homa vivo. La Transforma Psikologio (aŭ Esotera Kristanismo) instruas kiel tiu procezo funkcias kaj kiel generi tian energion.

#### LA MISTEROJ

La misteroj -Serio de studoj- estas teatraj reprezentoj alegoriaj, kiuj rilatas al la evoluo de l' homo kaj de l' universo.

La transiron de unu nivelo de esto al alia (nome, jam plenumita, jam atingita) oni celebris per speciala ceremonio: la inicado!

#### ĈIU DEVAS INICI SIN MEM !

La sistemoj, la skoloj aŭ lernejoj, la spiritaj gvidantoj povas indiki la metodojn kaj la vojojn, nome, ili povas GVIDI, sed neniu povas fari anstataŭ iu homo la psikologian laboron kiun li mem devas fari!

La interna kresko, transformiĝo de esto, dependas tute de la psikologia laboro pri si, kiun oni mem devas fari!

Resume kompilis: ERGOTO DE BONAERO

#### HISTORIO RIPETIĜAS

Henriko Estienne, franca literaturisto (1528-1598) kontraŭstaris la invadon de la itala lingvo en la francan dum ni havis florencaninon kiel reĝinon kaj la korteganoj strebis adapti siajn lingvon kaj moron al la itala modo.

Sed, fidela je la polemikaj kutimoj de sia epoko, li malpravis, kiam li insultis la kontraŭulon en "*Deux dialogues du nouveau langage françois italianisé*" (1578). Li skribis: "Estas permesate italogi, nur kiam oni parolas pri aferoj, kiuj vidiĝas nur en Italio, aŭ almenaŭ devenas de tiu lando, eĉ estas pli oftaj aŭ pli famaj ol en iu alia lando, kiel ekz.: "ĉarlatano, bufono, murdisto, trompo, timemo, fanfaronado".

Tiu jarcento ne estis pacema. Eĉ pri gramatiko, ortografio, oni interŝanĝis ofendojn. Ekzemple, Ludoviko Meigret (Megre) kvalifikis sian kontraŭulon "sovaĝa kaj kruela besto sub homa vizaĝo".

Nuntempe la esperantistoj ne devas uzi tiun vojon. Necesas montri, ke ni ne bezonas artifikojn tiajn por paroli pri la kvalito de nia lingvo kaj ke la taŭge deca kunekzistado de nia esperanta popolo ne estas vana vorto.

Gastono, 4an de junio '93.

# Riveroj

ekfluas...

Nia malnova amiko, peranto de L! en Japanio, MINE YOSITAKA, kune kun S-ro YOSIKAWA syōiti, lanĉas novan revuon "Riveroj", kiun ili nomas "interkultura". La unua numero, aŭg. 93, estas jam tre alloga, malgraŭ la, en la komenco, normala malmulto da kontribuintoj. Ĝi estas 36-paĝa en oportuna A5-formato, kaj zorgo presita. Aperos, espereble, 4 fojojn jare.

Interesatoj povas aboni per 48 n.gld al UEA-konto de la redaktoro : kodo "mine-v". Samtempe informu al :  
MINE Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, Takasago-si, Hyōgo-ken, 671-01 Japanio.

Eblas pagi ankaŭ al jena poŝtkonto :  
Osaka 0-253035 "RIVEROJ".

Kun varma simpatio kaj entuziasma aplaŭdo, bonvenon kaj sukceson deziras la red. de L!

\*\*\*\*\*

## VERDire plu iras...

Aperis la 11a n-ro de tiu "ekologiisma gazeto en Esperanto" en loga, profesie preparita vesto, kun enhavo ampleksa (24 paĝoj en A4-formato) kaj interesa. Tamen, en koncize trafa artikoleto la redaktoro bedaŭras, ke VERDire stagnas kun ne pli ol 120-150 abonantoj. VERDire celas ligi ĉiujn verdemajn E-istojn troviĝantajn en Verdaj Partioj, en aliaj politikaj movadoj, aŭ en nepolitikaj (ekzemple, la naturamikoj...).

Tiu bona gazeto indus do pli da legantoj, pli da kunverkantoj, por pli efike plenumi sian celon : roli ne nur kiel forumo de diversspecaj E-ekologianoj, sed ankaŭ kiel ilo por konvinki multajn lingve malhelpatajn ekologiistojn eklerni kaj ekuzi esperanton por sia afero.

La abono kostas 20 NLG. Konto : **vdr-d** ĉe UEA. Aŭ 13 irk al VERDire, Postboks 2280, N-9002 TROMSØ.

\*\*\*\*\*

la venonta numero de Laŭte aperos fine de novembro -

## LA PARABOLO PRI LA CISTERNO

*Estis iam tre seka lando, kies popolo tre bezonis akvon. Ĝi faris nenion ol serĉi akvon de la mateno ĝis la vespero kaj multaj pereis, ĉar ili ne povis trovi ĝin.*

*Tamen estis en tiu lando ankaŭ kelkaj homoj, pli ruzaj ol la aliaj, kaj ĉi tiuj estis kolektintaj akvoprovizon, dum la aliaj nenion povis trovi. La nomo de tiuj homoj estis kapitalistoj.*

*Tiel okazis, ke la homoj en tiu lando veris al la kapitalistoj kaj petis, ĉu ili volos doni akvon al ili por trinki el la akvo kolektita, ĉar ili multe suferas pro granda akvomanko.*

*Sed la kapitalistoj respondis : Iru for, vi malsaĝaj homoj ! Kial ni donus akvon al vi el la akvoprovizo kolektita de ni, ĉar tiam ni fariĝus tiel same kiel vi kaj kun vi pereus ! Sed vidu, kion ni faros por vi : Estu niaj servistoj kaj vi havos akvon.*

*Kaj la popolo diris : donu al ni nur akvon kaj ni estos viaj servistoj, ni kaj niaj infanoj. Kaj tiel okazis.*

*La kapitalistoj estis saĝaj homoj kaj distingiĝis per saĝo super sia generacio. Ili dividis la popolon, kiu servis ilin, en grupojn sub la ordono de oficiroj kaj estroj kaj sendis kelkajn grupojn al la fontoj por ĉerpi kaj aliajn ili sendis por serĉi pri novaj fontoj kaj aliajn por porti akvon. Kaj ĉiom da akvo estis portita al iu loko kaj tie la kapitalistoj konstruigis grandan cisternon por konservi la akvon kaj tiun ujon ili nomis la Merkato. Tien devis veni la servistoj de la kapitalistoj por akiri akvon. Kaj la kapitalistoj diris al la popolo : Por ĉiu sitelo da akvo, kiun vi alportos al ni, ni*

donos al vi po unu penco kaj por ĉiu sitelo da akvo, kiun ni ĉerpos el la cisterno, pro ke vi povu trinki, vi kaj viaj edzinoj kaj infanoj, vi donos al ni po du pencoj. Kaj la diferenco estos nia profito, ĉar ni ne farus ĉion ĉi por vi, se ne estus por tiu profito kaj vi do ĉiuj devus pereji.

Kaj tiel estis bone en la okuloj de la servantoj, ĉar ili havis malviglan intelekton kaj ili diligente alportis akvon en la cisternon dum multaj tagoj kaj por ĉiu sitelo, kiun ili alportis, la kapitalistoj donis al ĉiu viro po unu penco. Sed por ĉiu sitelo, kiun la kapitalistoj ĉerpis el la ujo kaj donis al la popolo por trinki, la popolo donis al la kapitalistoj po du pencoj.

Sed post kelka tempo la cisterno, kiu nomiĝis Merkato, estis plerplena kaj la akvo transbordiĝis, ĉar por ĉiu sitelo, kiun la akvoportistoj verŝis en la cisternon, ili reakiris nur tiom, ke ili povis aĉeti duonan sitelon. Kaj pro la restaĵo, kiu kuŝis en la cisterno, ĉi tiu baldaŭ tropleniĝis, ĉar da portistoj estis multe, da posedantoj nur malmulte kaj ĉi tiuj ne povis trinki pli ol la aliaj. Tiel okazis, ke la cisterno estis plenplena. Kiam la kapitalistoj vidis, ke la akvo fluas trans la randon, ili diris al la popolo :

- Ĉu vi vidas, ke la akvujo, kiu nomiĝas Merkato, estas tro plena? Sidiĝu kaj atendu paciencoj ĝis la cisterno ree estos malplena ; ni tiam redungos vin.

Sed kiam la popolo ne plu ricevis pencojn de la kapitalistoj, ĝi ne plu povis aĉeti akvon, ĉar posedis nenion por pagi. Kaj la kapitalistoj maltrankviliĝis, vidante, ke ili ne plu ricevas profiton, ĉar neniu aĉetis akvon de ili. Kaj al la grandaj vojoj ili dissendis virojn, kiuj devis voki : Ĉiu, kiu soifas, venu al la cisterno kaj aĉetu akvon de ni ; estas sufiĉa provizo !

- Ĉar, diris la kapitalistoj inter si, vidu, la tempo estas malbonaj, ni devas reklami.

Sed la popolo respondis : Kiel ni povus aĉeti, ki-

am vi ne dungas nin, dum ni volonte aĉetus akvon, ĉar ni soifas. Kaj vi ne bezonus reklami.

Sed la kapitalistoj diris al la popolo :

- Ĉu ni redungu vin por ankoraŭ alporti pli da akvo? Kiam la cisterno, kiu nomiĝas Merkato, jam superfluas ? Vi unue devas aĉeti akvon kaj kiam la cisterno estos malplena, ni denove dungos vin por plenigi ĝin.

Kaj tiel okazis, ĉar la kapitalistoj la popolon ne plu dungis por alporti akvon, ke la popolo la akvon, kiun ĝi jam alportis, ne povis aĉeti. Kaj la homoj parolis pri tiuj ĉi aferoj kaj diris : "Estas krizo".

Kaj la soifo de la popolo estis granda, ĉar ne estis nun kiel en la tagoj de la prapatroj, kiam la tuta lando estis disponebla por ili, por ke ĉiu serĉu akvon por si mem.

Sed la kapitalistoj estis uzurpintaj ĉiujn fontojn kaj ĉiujn putojn kaj akvoprovizojn, por ke neniu povu akiri akvon, escepte nur el la cisterno, kiu nomiĝas Merkato. Kaj la popolo murmuris kontraŭ la kapitalistoj kaj diris :

- Vidu, la akvujo estas plenplena kaj ni mortas pro soifo. Domu al ni akvon, ke ni ne pereu !

Sed la kapitalistoj respondis : Ne, la akvo apartenas al ni ; vi ne trinkos da ĝi, se vi ne aĉetos ĝin de ni per via mono. Kaj ili ĵuris per ĵuro kaj diris laŭ siaj kutimoj : "Negoco estas negoco". Sed la kapitalistoj maltrankviliĝis, ĉar la popolo ne plu aĉetis akvon kaj ili do ne akiris plu profiton kaj ili diris unu al la alia : - Ŝajnas, ke nia profito ĉesigis nian profiton kaj pro tio ni nun ne plu povas fari profiton. Kio kaŭzas, ke nia profito ne plu estas profitdona, kaj malriĉigis nin ? Ni konsultu la profetojn, ke ili klarigu al ni tiujn ĉi aferojn. Kaj ili venigis ilin.

La profetoj estis homoj, kiuj estis kleraj kaj povis kaŝi la veron de la aferoj per multaj orakolaj vortoj. Ili sin kunigis kun la kapitalistoj por

tiel akiri akvon por si kaj siaj infanoj. Kaj la kapitalistoj demandis al ili, kio kaŭzas ke la popolo ne plu aĉetas akvon de ili, kvankam la cisterno estas plena.

Kaj kelkaj el la profetoj diris : - La kaŭzo estas la tro granda produktado.

Sed tion arde kontraŭis aliaj, kiuj diris, ke la kaŭzo estas tro malgranda konsumado. Kaj denove aliaj diris, ke la kaŭzo estas makuloj sur la suno, tiel ke la tero troviĝas en malfavora pozicio. Ankorau aliaj diris : Ĉio ĉi estas senseca ; la malbono fariĝis pro manko de konfido. Kaj dum la profetoj, laŭkutime, interdisputis, la viroj de la profito dormis. Kaj kiam ili vekigis, ili diris al la profetoj : Nun sufiĉas, vi konsolis nin. Iru nun por ankaŭ al la popolo doni konsolon, ke ankaŭ ĝi trankviliĝu ! Kaj lasu nin en paco.

Sed la profetoj ne ŝatis iri al la popolo, ĉar ili ne ĝuas fidon ĉe ĝi, kaj ili diris al la kapitalistoj : - Mastroj, la sekreto de nia arto estas, ke nur tiuj, kiuj satas kaj ne soifas kaj havas ripozon, povas trovi konsolon per niaj paroloj. Tiuj, kiuj soifas, ne trovos pacon en niaj vortoj, kontraŭe, ili mokos nin, ĉar laŭŝajne, kiam ili ne estas satigitaj, nia saĝo estas kvazaŭ malplena kaj sensignifa.

Sed la koleraĵoj kapitalistoj diris : - Iru ! Ĉu ne estas via tasko plenumi tion, kion ni ordonas al vi ?

Kaj la profetoj iris al la popolo kaj klarigis la sekreton de la tro granda produktado kaj kiel okazis, ke ili devas pereji pro soifo, ĉar estas tro multe da akvo, kaj kial la popolo ne povas havi sufiĉe, ĉar la provizo estas tro granda. Kaj tiel same ili parolis al la popolo pri la makuloj sur la suno kaj diris, ke ĉio ĉi venis pro manko de konfido.

Sed okazis tiel, kiel la profetoj antaŭdiris, ĉar

al la popolo ilia saĝo ŝajnis senenhava kaj sensignifa kaj la popolo mokis ilin, kriante : - Foriru, sentaŭguloj, ĉu vi volas moki nin ? Ĉu povas el abundo naskiĝi malsato ? Ĉu nenio povas naskiĝi el multo ?

Kaj ili kolektis ŝtonojn por ĵeti al ili, kaj la kapitalistoj timis, ke la popolo perforte alproprigus al si la akvon el la cisterno. Tiam ili sendis iujn sanktajn virojn (sed estis falsaj pastroj!), kiuj admonis la popolon resti trankvila kaj ne ĝeni la kapitalistojn, eĉ se ĝi soifas.

Kaj tiuj sanktaj viroj, kiuj estis falsaj pastroj, atestis antaŭ la popolo, ke tiu ĉi malfeliĉo estas sendita de Dio por la savo de iliaj animoj kaj ke tiu, kiu estas pacienca kaj ne murmuris, venos post sia morto en landon, kie ne ekzistas kapitalistoj kaj kie estas abundo da akvo. Kaj la popolo, kiu ne sufiĉe konis la sanktajn skribojn, kredis tion en sia naiveco.

Estis tamen kelkaj veraj profetoj de Dio kaj ĉi tiuj kompatis la popolon. Ili ne volis false atesti por profito de la kapitalistoj, sed sin esprimis malfavore pri ili.

Kiam nun la kapitalistoj vidis, ke la popolo ankoraŭ ne trankviliĝis, ke nek la vortoj de la profetoj, nek tiuj de la falsaj pastroj havas influon, ili iris mem al la popolo. Ili trempis siajn fingropintojn en la akvon, kiu transbordiĝis, kaj ĵetis la gutojn de siaj fingropintoj inter la popolon, kiu varmis ĉirkaŭ la cisterno. Tiuj gutoj nomiĝis "filantropio" kaj estis tre amaraj.

Kaj tiam la kapitalistoj denove vidis, ke nek la vortoj de la profetoj, nek la gutoj nomitaj "filantropio" trankviligis la popolon, kiu ĉiam pli furioze amasiĝis ĉirkaŭ la cisterno, kvazaŭ ĝi perforte volus konkuri ĝin. Tiam la kapitalistoj interkonsiliĝis kaj sekrete sendis virojn inter la popolon. Kaj tiuj viroj elserĉis la plej fortajn, kiuj plej bone povas batali. Al ili ili aparte parolis, dir-



ante : - Kial vi ne kunlaboras kun la kapitalistoj ? Se vi volas servi ilin kaj malebligi, ke la popolo konkeru la cisternon, tiam vi havos abundon da akvo kaj nek vi nek viaj infanoj bezonos pereji.

Kaj la fortaj viroj aŭskultis tiujn parolojn kaj laŝis sin persvadi, ĉar ankaŭ ili estis naivuloj kaj soifis. Kaj la kapitalistoj donis al ili bastonojn kaj glavojn kaj ili skurĝis la popolon, kiam ĝi interpuŝiĝis ĉirkaŭ la cisterno.

Kaj post multaj tagoj la akvo malaltiĝis, ĉar la kapitalistoj konstruis fontanojn kaj fiŝlagetojn kaj sin banis en la akvo, ili kun siaj edzinoj kaj siaj infanoj ; ili uzis ĝin por sia plezuro.

Kiam la kapitalistoj vidis, ke la cisterno estas malplena, ili diris : - La krizo estas finita.

Kaj ili sendis virojn por denove dungi la popolon por replenigi la cisternon. Kaj por la akvo, kiun la popolo alportis, ĉi tiu ricevis por ĉiu sitelo po unu penco, sed por ĉiu sitelo, kiun la kapitalistoj donis el la cisterno al la popolo, por du pencoj devis esti pagataj, ĉar ili ja devis akiri profiton. Kaj post mallonga tempo denove superfluis la cisterno same kiel antaŭe. Kaj kiam la popolo soifis pro manko de akvo, dum tiu ĉi estis malŝparata de la kapitalistoj, tiam ribelis viroj en la lando, kiujn oni nomis malpacigantoj. Ĉar ili vekis la popolon kaj diris, ke ĝi devas unuiĝi, kaj tiam ĝi ne bezonos plu esti servisto de la kapitalistoj kaj soifi al la akvo.

Kaj en la okuloj de la kapitalistoj tiuj, kiuj tiel parolis, estis danĝeraj homoj. Tial ili volonte krucumus ilin. Sed ili ne kuraĝis pro timo je la popolo. Kaj la malpacigantoj parolis al la popolo tiel : - Vi malsaĝuloj, kiom longe vi ankoraŭ lasos vin trompi per mensogo ? Kaj vidu vian malprofiton en tio, kio de nun esti via profito, ĉar ĉio, kio estas parolita al vi, estas nenio ol malice elpensitaj fa-

beloj. Kaj ankaŭ tio, kion diris la sanktaj viroj, ke estas la volo de Dio, ke vi ĉiam estu malriĉaj, mizeraj kaj soifaj. Ili estas blasfemantoj kaj mensogantoj ; Dio akre juĝos ilin, kvankam ili multajn pardonos.

- Kial vi ne rajte povas havi tiun akvon ? Ĉu ne estas, ĉar vi ne havas monon ? Kaj kial vi ne havas monon ? Ĉu ne estas, ĉar vi ricevas nur po unu penco por ĉiu sitelo, kiun vi alportas en la cisternon ? Tio estas la merkato-prezo, tamen vi devas doni po du pencoj por ĉiu sitelo, kiun vi prenos el la cisterno, por ke la kapitalistoj akiru profiton. Ĉu vi ne vidas, ke tiel la cisterno devas superflui ? Ĉi ja pleniĝas per tio, kion vi nepre bezonas kaj la absurdo formiĝas per tio, ke vi ne estas satigataj. Ĉu vi ne vidas, ke ju pli streĉe vi laboras kaj ju pli diligente vi serĉas akvon kaj alportadas, des malpli grandiĝos via profito kaj ĉu tio ĉiam devas resti tiel ?

Tiel parolis la malpacigantoj dum multaj tagoj al la popolo ; ĝi ne atentis ilin. Sed tamen post mallonga tempo ĝi komencis aŭskulti al ili kaj respondis : - Vi parolas veron. Estas pro la kapitalistoj kaj iliaj profitoj, ke ni suferas mankon. Ni nun vidas, ke pro ilia kulpo ni neniam ĝuos la fruktojn de nia laboro ; do nia laboro estas senfrukta, kaj ju pli rapide ni laboras por pleniĝi la cisternon, des pli baldaŭ ĉi tiu superfluas kaj ni ricevas nenion.

- Ĉar estas tro multe da ĝi, diras la profetoj. Sed pripensu, ke ne eblas moki la kapitalistojn kaj ili estas kruelaj eĉ per siaj indulgoj. Diru al ni, ĉu vi scias rimedon por liberigi nin de ilia regado. Sed se vi ne scias bonan vojon por liberigi nin, ni petegas vin, ke vi ne okupu vin pri ni, por ke ni povu forgesi nian mizeron.

Kaj la malpacigantoj diris : - Ni scias tiun vojon !

Kaj la popolo diris : - Ne trompu nin, ĉar tiu ĉi situacio ĉiam ekzistis, neniu trovis rimedon por liberigo, kvankam multaj zorgoplene serĉis ĝin per larmoj. Sed se vi scias rimedon, diru ĝin tuj al ni.

Tiam parolis la malpacigantoj pri tiu ĉi rimedo kaj diris : - Pensu, kiaj estas viaj rilatoj kun tiuj kapitalistoj, kiel vi lasas al ili la rezultojn de via laborado. Kion do ili faras por vi, ke vi pagas al ili tiun ĉi taskon? Ho, estas, ĉar ili surmetis al vi jugon kaj difinas viajn taskojn, por poste doni al vi malmulte da akvo, kiun alportis vi kaj ne ili. Aŭdu do la rimedon por liberigi vin el la sklaveco : faru por vi mem kion ĝis nun faris la kapitalistoj por vi, difinu vian propran laboron, forskuu viajn katenojn kaj dividu viajn devojn. Tiam vi ne plu bezonos la kapitalistojn, vi ne plu bezonos zorgi plue pri la kapitalistoj kaj pri ilia profito ; la fruktojn de via laboro vi dividus kiel fratoj, ĉiu akiros la saman kvanton, tiam la cisterne neniam superfluos antaŭ ol ĉiu estos plene satigita kaj vi faros el tio postrestonta belajn fontanojn kaj fiŝlagetojn, same kiel faris la kapitalistoj, sed tiam ĉiuj ĝuos tion.

Kaj la popolo respondis : - Kiel ni devas agi ? Ĉar la rimedo ŝajnas bona al ni.

Kaj la malpacigantoj respondis :  
- Elektu saĝajn virojn por reguligi viajn devojn kaj fiksi vian laboradon. Ili faros kion iam faris la kapitalistoj. Sed ili ne estos kiel viaj mastroj, sed viaj fratoj kaj la plenumantoj de via volo, ili ne atentis pri propra profito, ĉiu havos la saman parton, mastroj kaj servistoj ne plu ekzistos. Ni estos fratoj kaj, de tempo al tempo, kiam vi juĝos tion necesa, vi denove elektos saĝajn virojn, por anstataŭigi la iamajn.

Kaj la popolo aŭskultis kaj aprobis la rimedon.

Ŝajnis ne malfacile kaj unuvoĉe oni kriis : - Lasu ĝin esti tiel, kiel vi diris tion, ni volas tion.

Kaj la kapitalistoj aŭdis la bruegon de iliaj voĉoj kaj ankaŭ la profetoj aŭdis tion kaj la falsaj pastroj kaj la fortaj batalantoj, kiuj devis defendi la kapitalistojn. Kaj kiam ili aŭdis tion, ili tremadis, ke iliaj genuoj fleksiĝis kaj ili diris unu al la alia : - Tio estas nia fino...

Sed estis ankoraŭ veraj profetoj de Dio, kiuj ne volis profiti per profito de la kapitalistoj, sed kompatis la popolon, kaj kiam ili aŭdis la kriojn de la popolo kaj eksciis, kion ili elvokas, ili tre ĝojis kaj dankis Dion pro tiu ĉi liberigo.

Kaj la popolo foriris kaj faris ĉion, kion la malpacigantoj estis dirintaj al ili. Kaj ne plu estis sciifantoj en la lando, nek malsatantoj nek nuduloj nek frostiĝantoj, neniu suferis mankon kaj la viroj nomis la aliajn fratoj kaj la virinojn fratinoj. Tiel ili estis kiel fratoj kaj fratinoj, kiuj vivadis en harmonio kaj la beno de Dio estis por ĉiam super tiu lando.

Laŭ tradukoj de SAI-ano 17403 kaj de G.H.B. kompilredaktis SAI-BS.

## LA SENMONA MONDO

## DE BELLAMY

Edvardo Belami naskiĝis la 26an de marto 1850 en Masaĉuseco en Usono. Li antaŭdiris en 1887 la radion, la televidadon, aertrafikon, mondhelpingvon kaj la nuntempan mondkrizon kaj donis la solvon eliri el ĉi-lasta.\*

Nun, kiam evidentiĝas, ke la meĥanikigo de la industrioj senlaborigas milionojn da homoj, estas utile pli profunde studadi la verkojn de Belami "**Rigardo malantaŭen**" kaj "**Egalo**".

Por ke fariĝu neeble, ke sekve de inventoj, laboristoj iĝu senlaboraj pro la aplikado de la inventoj, Belami propagandis, ke la MONO "kiel obstaklo" malaperu. Ne la kreanta forto de la inventistoj malfortiĝu, kontraŭe, eĉ ankoraŭ pli ol en la nuno, oni klopodu efektiviĝi ke en la senmona socio stultigaj laboroj estu farataj de maŝinoj.

Se oni opinius, ke la privata iniciativo perdiĝos, aŭ ke oni ne havos la necesan energion por cerbumi pri novaj aferoj pro malesto de la mono, tiam oni pensu pri tiu amaso da intelektuloj, kies spirita ĝuo pro farataj teorioj kaj praktikaj inventoj kaj malkovroj kontentigas internan evoluemon, sen ke ili per tio gajnas unu cendon, ekzemple astronomoj, biologoj, matematikistoj, ĥemiistoj, fizikistoj kaj ekonomiistoj.

Kiom da miloj da laikoj jam estis, kiuj pro pura intereso estas serĉintaj la "Perpetuum mobile" kaj kiom da aliaj estas, kiuj pro manko de mono ne povas realigi siajn inventojn. Oni rigardos kiel honoron ree esti alportinta ion novan, tiel ke spirit-malakriga laboro ne bezonas esti farata de homoj. Tiam la inventoj fariĝos beno por la homaro, dum nuntempe inventoj servas nur por riĉigi unuopulojn kaj ofte eĉ ne donas profiton al la inventintoj mem, kaj kaŭzas al aliaj homoj senlaborecon.

Interŝanĝkomerco inter la individuoj ne okazos, ĉar ĉiu ricevos ĉeklibron, per kiu li povos havigi al si, kion li bezonas por la ĉiutaga vivo kaj distro. La ĉekskribado estas jam nun ĝenerala ; la diferenco estas tamen, ke oni nun, ĉu mem aŭ iu alia, devas deponi monon kaj post tio povas skribi ĉekojn, dum oni ricevos en la Belami-socio ĉeklibron kiel rekompencan por faritaj aŭ farotaj servoj. Interŝanĝkomercado ankoraŭ okazos inter diversaj regionoj, kaj ne, tiel kiel ni jam rimarkis, inter la homoj mem.

Ekzemple ni povus transporti ovojn al alia regiono, dum tiu regiono povus transporti al ni duonlaboritaĵojn. La varvaloron oni povas montri, aŭ per mono, aŭ per laborhoroj, aŭ per alia maniero.

Viroj kaj virinoj estos samrajtaj ; oni vizitos ĝis la 19a vivjaro lernejon, poste oni povos studi plu, se inklino, intelekto, talento kaj kapablo rajtigas tion. Se oni ne montras inklino al plua studado, tiam oni tuj post la lernotempo komencas labori. Ĉiu laboros nur tiom da horoj, kiom montriĝos necesaj por la ĝeneralaj bezonoj kaj la plej malagrablajn laborojn oni igos allogaj, per proporcia malpliigo de la laborotempo (laborhoroj). Troproduktado malebliĝos, ĉar nur tiom estos produktata, kiom estos necesa por propra ekzisto aŭ por akiri varojn necesajn kiel interŝanĝaĵoj kun aliaj regionoj.

Plej unualokaj estu gvidkapablaj personoj, kiuj estos elektataj el kaj de la plenkreskaj interesigantoj. La maltrankviliĝo pro la estonta tempo malaperos, ĉar ĉies ekzisto estos certigita. Estas tute superflue, ke iu ricevu, ekzemple monate, pli grandan sumon sur sian ĉeklibron ol alia homo.

La elspezoj reguliĝas laŭ ĝenerala bezono kaj aĝo. Estante kripla, invalida, nenormala, malsana, blinda, muta, ktp, oni havos precize la samajn rajtojn kiel ĉiu, materie kaj (aŭ) mense perfektsimila. Oni laboros ĝis la 45a, poste oni povos esti vokata ĝis la 55a, por helpi mildigi suferojn dum eventualaj naturkatastrofoj aŭ epi-

demioj. Ankaŭ infano ricevos ĉeklibron, kiu estos administrata de la gepatroj aŭ zorganto ĝis ĝia plena maturiĝo.

Proksimume 90 % el la nunaj krimoj rezultas el avido kaj granda parto de la frenezulejoj estas loĝata, ĉar la homoj nerve malsaniĝas pro perdo, nehavo, aŭ pro mondezirego. Ankaŭ la malliberejoj kaj same la frenezulejoj fariĝos pli kaj pli superflujaj.

Se iu laŭ sia naturo pro apatio ne povas aŭ ne volas disponigi siajn fortojn por la socio, tiam li estu instruita de specialaj pedagogoj. Oni instruas lin interesiĝi pri la komunumo.

Jen konciza skemo, elpensita de Belami jam en 1887 por solvi la mondkrizon. Sola la perioda mizero povos efektiviĝi ĉi tiun ideon, ĉar solvo estu trovota, per kiu ĉiu, kiu estas kapable laborvola, povos akiri laboron. La kriza mizero igos laŭgrade la homojn kapablaj ekkompreni la vojojn montritajn de la grandaj pioniroj de la homaro, inter kiuj Belami ne estis la plej malgrava.

\* Tiu ĉi artikolo origine aperis en "Sennacieca Revuo" de 10.sept.1933.

\*\*\*\*\*

### BIBLIOGRAFIO en esperanto

- \* E. Bellamy. **Rigardante malantaŭen en la Jaro 2000.**  
(tr. Hamaker, 1937). Socia romano, kiu inspiris la movadon **Internacia Asocio Bellamy**. Elĉerpita.
- \* Th. Stillebroer. **Liberigo de Timo kaj Mizero.** (tr. C. Joon)  
24-paĝa broŝuro eldonita de Internacia Asocio Bellamy. Elĉerpita.
- \* Henri Muller. **Jaro 2000. Revolucio sen perdantoj.**  
(Esperantigis : Abundana Frakcio de SAT, 1984). 168-paĝa libro, **Jaro 2000** prezentiĝas kiel ia reunigo de la verko de Bellamy, konsidere al la progresoj elfaritaj de post la lasta jarcento pri la ekonomia esplorado kaj la novaj sociaj kondiĉoj de nia epoko. Havebla ĉe SAT-Broŝurservo.